5-a Jaro. N-o 236 APERAS



SEMAJNE 11. Aprilo 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

LA VENONTA VENENGAS-MILITO

Post la mondmilito la organizita laboristaro okupis sin precipe pri tio malhelpi novan hombuĉadon. Multege da longaj decidoj tion pruvas. En ili estas esprimite, ke ĉiu moderna milito havis nur unu venkiton — la Proletaron kaj unu venkinton — la kapitalistaron. Pro tio ankaŭ estas kompreneble, kial tiu lasta klaso tiom favoras la interpopolan malamikecon; kaj pro tio alifianke estas nepre necese, ke la Proletaro malebligu ĉiuspecan militon.

Sed krom alpreni decidojn oni preskaŭ nenion faris. Tiun senzorgecon verŝajne kaŭzas la ekkono, ke la laboristaro travivinte la mondmiliton ne plu tiel same patriotiĝos kiel en 1914, kaj se la reganta klaso provus ekbruligi fajron, ĝi sendube ne denove sukcesus[1].

Sed per la nura indigno ni ne povas eviti novan militon. Oni nur bezonas rigardi, kiel la nova milit-tekniko anstataŭigis pafilojn, maŝinpafilojn ktp. per aviadiloj kun venengaso, simpligante kaj terurigante tiele la hombuĉadon. Certe, la malnovaj mortigiloj ankaŭ estis teruregaj, sed oni povis sin almenaŭ parte gardi kontraŭ tio — tion pruvas la multaj "hejmmilitistoj" kaj "postfront-herooj".

Sed en la venonta milito ne plu ekzistos "postfronta regiono" — la tuta lando estos batalfronto. Dum kelkaj horoj aerŝiparo povos flugi en internon de iu lando, bombardante ĝin per venengas-bomboj, buĉante virojn, virinojn kaj infanojn sen diferenco pri sekso kaj aĝo. Antaŭ ol konsciiĝi pri tio, tuta loĝantaro estos ekstermita, ĉar la gaso estas senodora. Enspirinte ĝin ĉiu vivaĵo mortiĝos; tion pruvis la terura ekzemplo de Hamburg, kie senpripensaj entreprenistoj okazigis katastrofon. Pro maldenseco de konservujo liberiĝis la gaso. Homoj enspirintaj la ĥemiaĵon parte mortis, kvankam tuj ĉeestis helpantoj, parte ili longdaŭre malsanegis. Se jam malfeliĉa akcidento okazigas tian rezulton, oni pripensu do, kio okazos, kiam la gaso sisteme estos disblovata.

La venengas-milito ankaŭ ne plu bezonigos tiom da militistoj. Kelkmil aviadistoj sufiĉas por efektivigi plej sukcesplenan amasan ekstermadon. Ne plu necesas antaŭpretigoj kiel armado, vestado, alfrontigo ktp. Pro tio ankaŭ la militkontraŭuloj ne trovos tempon por interkomprenigi sin. Ankoraŭ ne konsciiĝante, jam ili estos surprizitaj kaj eble eĉ mortigitaj.



Ĥemi-laboristo

Nun oni povas diri, ke la venengaso, minacante ĉiujn, la kulpulojn kiel la senkulpulojn, la profitemulojn kiel la ekspluatatojn, ne diferencigas inter homoj kaj bestoj, sed ekstermos ĉiujn. Tiu fakto povus esti bona malinstigilo por la milit-profitemuloj kaj iliaj servistoj. Sed tiu supozo ĝustas nur malgrandparte, ĉar la profitemuloj posedas aŭtomobilojn por ĝustatempe ekforveturi. La urba proletaro ne konscia kaj unuavice minacota, ne posedanta aŭtomobilojn, estos la ĉefa suferanto en la milito!

Pri la venengaso kaj ties efikoj diskutis kunveno de internacia virinligo en Frankfurt-Main (jan. 1929). Por tiu ĉi urbo, en kiu troviĝas grandaj venengasfabrikoj, tiu kunsido havis apartan signifon, ĉar ĝi estas unuavice minacata. En ĉi tiu kunveno parolis specialistoj internacie fame konataj pri venengaso kaj defendado kontraŭ ĝi. Sed kiuflanken ajn ili turnis la aferon, la finrezulto ĉiam estis: "Ekzistas nenia ŝirmilo kontraŭ venengaso!"

Profesoro D-ro Levin (Berlin) parolis pri 25 diversaj gasoj, kontraŭ kiuj ĝis nun tute ne ekzistas ŝirmilo. La sveda milit-ĉefo Brunsberg diris, ke la milito estos kvazaŭ motorigita. La milit-aviadiloj, da kiuj ekzistas hodiaŭ proks. 15 000 (krom 3000 civilaj) kapablas nerimarkate enflugi fremdan teritorion, kaj ĉiu aviadilo povos ekflamigi ĉ. 100 brulegojn samtempe. La pola kuracistino Budzinska rakontis el siaj spertoj dummilitaj pri la teruregaj suferoj de la gasvenenitaj homoj: nur dekono da ili restis vivanta. La germana studkonsilisto Nestler, kiu estis gas-oficiro dum la milito, diris, ke ekzistas nenia defend-ebleco, — aŭ la ŝirmiloj estas tro multekostaj aŭ ne sufiĉe taŭgaj. La registaroj, timante popolan ribelon, ne riskas publikigi tiajn faktojn.

Nu, kion fari kontraŭ tiu abomena danĝero, minacanta precipe la laboristaron? Ĉu konfidi al la deklaroj de la registaroj? Tiam ni denove estus perfidotaj, ĉar ankoraŭ ĉiam la registaroj estas la reprezentantoj de l' kapitalismo kaj bezonas la armadon por akiri profiton kaj por sin apogi sur la ar-

[1] Bedaŭrinde tiun optimismon ni ne povas dividi kun la verkinto. — *Red.*

PRO KADAVRO DE KADAVRIGINTO

La stratoj de Parizo, en kiuj la laboristoj neniam havas rajton manifestacii por siaj elpostuloj, prezentis la 26. marto la scenejon por grandskala patriota spektaklo: la solena entombigo de marŝalo Foŝ (france: Foch). Tio estis bonvena okazo por reveki kaj revigligi ĉiujn iom fordormemajn instinktojn de plej kruda religiemo kaj patriotismo. Devis reviviĝi el profundo instinktoj, kiuj kun elementa forto trafuriozis senkatenite Eŭropon antaŭ dekunu jaroj, je la tago de l' militeksplodo. La morto de militestro eltiris sub cindro ardetantajn, ŝajne jam estingiĝintajn sentojn al nova vivo — spite la nuntempa realo internacia . . .

Parizo malsaniĝis je ŝovinismo! Dimanĉon (24.3.), sub Arko de Triumfo, sur la Stela Placo (fr.: Place de l' Etoile), kunpremiĝis tioma amasego da feliĉuloj por rigardi la elmetitan kadavron, ke pli ol 150 personoj kontuzvundiĝis kaj eĉ 1 maljunulo mortis. Ili ja ne vane suferis, tiuj malfeliĉaj viktimoj de troa fervoro . . . viktimiĝis ili en momento de admirinda ekstazo! . . .



Tiu bildo ne prezentas karnavalan procesion. Ne, tute ne. Ĝi koncernas la veturigadon de la Foŝa kadavro tra la stratoj Parizaj. Oni rimarku, ke ne malpli bone ol la aliaj aktoroj de tiu funebra komedio ludas la ĉevalo sian rolon . . .

Sed tio estis nur la komenco de la spektaklo. Nenion malzorgis la reĝisoroj, por stimuli en la animoj de l' simpluloj, superstiĉuloj, senkonsciuloj, de l' forgesemuloj la religi-patriotan senton. Ili certigis al si per la parlamento la necesan monsumon — proks. duonmilionon da frankoj! — por la "nacia entombigo" en plej granda pompo kaj brilego. Por trafe influi la blindan amason, estis aplikataj ĉiuspecaj ceremoniaj artifikoj, kiuj povas inciti la sentojn: tiel en unu vespero sub Arko de Triumfo okazis ceremonio de generaloj, el kiuj la plej aĝa havis la honoron reekbruligi la "eternan flamon" sur la Tombo de l'Nekonata Soldato...

Infanaĵoj — jes — sed infanaĵoj kun tre seriozaj efikoj . . .

Kiel ĉiuokaze, la gazetaro estis la plej bona helpanto por krei animstaton konvenan: ĝi komparis Foŝ kun Napoleono la I, ĝi priskribis lian vivon kaj konduton ĝis la plej bagatelaj detaloj, ĝi glorigis ĉion en li, homajn kaj soldatajn kvalitojn, por fari lin populara, por martelfrape encerbigi al la kredemularo, ke estis LI "la glora venkinto" en la mondmilito!

La gazetaro akiris facilan venkon ĉe la fetiĉuloj: miliono da parizanoj iris por edifi sin ĉe vido de ĉerko, emociiĝis, ekstazis . . . Se la komunista gazeto de Parizo skribas, ke "la laboristoj de Parizo ignoris la paradon", tio estas bedaŭrinde nur parte vera: se oni pripensas, kiom malgranda elcento da laboristoj en Francio estas organizita kaj staras sub influo de klasbatalaj partioj, kioma kvanto da ili ensuĉas ĉiutage la tendencajn sciigojn de burĝa gazetaro senkritike, — sin ne trompante oni povas konkludi, ke ankaŭ multaj laboristoj estis inter la rigardantoj emociitaj de l' spektaklo.

Mem partopreni la paradon funebran ili ja ne povis, ĉar por tio estis bezonataj specialaj invitiloj. La privilegion akompani la kadavron de l' katedralo "Notre Dame" (Nia Sinjorino) tra la centraj partoj de l' urbo ĝis Hotelo de Invalidoj havis nur specialaj kategorioj de homoj: pastraro, soldataro, princoj, parlamentanoj, ambasadoroj, altlernejaj studentoj, akademianoj, ligoj de patriotaj eksmilitintoj. La eklezio havis aparte belan okazon por propagando: unuavice, antaŭ la mortveturilo, marŝis francaj ĉefepiskopoj en sia kvazaŭteatra kostumo. La kadavro troviĝis sur kanono de 75, tirata de ses ĉevaloj. Antaŭ ĝi marŝis nigre vualite la batalĉevalo de l' marŝalo! Sekvis la delegitaroj de l'eksterlandaj armeoj alfabete ordigitaj, angloj, skotoj, ĉeĥoj, poloj, rumanoj, marokanoj, usonaj legianoj kaj multaj aliaj, por ne forgesi taĉmenton da soldatoj el la faŝista Italio.

Efektive la militista merito de Foŝ konsistas ja en tio, ke li komandis en la finperiodo de l' granda milito super la tutaj aliancaj armeoj. Li estis militaristo ĝisosta, soldato, kiu amis el tuta animo sian profesion kaj plenumis kun necedema persisto la taskojn donitajn. Interese estas noti, ke li estis edukata ĉe la jezuitoj (kaj lia frato estas jezuita pastro).

La tuta reakcia Francio kolektiĝis ĉe lia kadavro kaj havis mirindan altirforton sur vastajn etburĝajn rondojn. Pompo kaj reklamo? Jes. Tio klarigas multon. Sed, la efikoj estas la samaj kiel en 1914: la homoj same kiel en 1914 kun entuziasmo kaj ekstazo estas pretaj partopreni novan patriotan buĉadon. Kio povas ligi la laboristojn super la landlimoj, estas nur la klaskoncio kaj ni bedaŭrinde devas konstati, ke ĝi estas tre malforta kompare kun la nacikonscio.

Postnoto. — En la samaj tagoj, kiam oni brue kaj pompege entombigis Foŝ, kaj reklamis plej sensacie pri li kiel senkompara militheroo, la gazetaro senbrue kaj sen distinga glorigo notis pri la morto de generalo Saraj' (france: Sarrail). Kial tia diferenca traktado? Nu, ĉar la unua, Foŝ, estis ne nur granda patrioto sed ankaŭ pia katoliko; dum Saraj', kvankam same bona patrioto kaj militheroo, ne estis ekleziano. Mankis do al li unu necesa kvalito por havi plenan laŭdon de l' reakcio. Lia enterigo okazis civile.

---

miloj, kiam estos ŝanco por akiri pli grandajn profitojn per tiu rimedo. Iam estis la kirasplat-fabrikantoj, hodiaŭ estas la potenculoj de la ĥemi-trustoj, kiuj atendas profiton el milito. Kiel iam la "buŝeg-patriotoj"-grenadfabrikantoj interŝanĝis siajn fabrikajn sekretojn kaj eĉ la fabrikaĵojn kun aliaj ŝtatoj, tiel nuntempe interŝanĝas la ĥemi-trustoj siajn inventojn. Sed interŝanĝo eĉ ne plu necesas, ĉar la trustoj jam internaciiĝis! La milit-profitemuloj estas internacie organizitaj kaj tial ili ĉiam venkos!

Por la laboristoj el ĉiuj landoj stariĝas la urĝega tasko priatenti kaj atentigi la minacantan danĝeron, ĉar subtaksi ĝin signifus krei la kondiĉojn por terurega vekiĝo, multe pli terura ol en aŭgusto 1914. La laboristaro de la ĥemia industrio precipe devas okupi sin pri la venendanĝero kaj defendo kontraŭ ĝi. Kvankam ankaŭ burĝaj rondoj klopodas deturni la venengas-katastrofon, antaŭvidante ĝian neeviteblan alvenon, la ĉefan kaj plej efikan batalon kontraŭ ĝi devas fari la laboristaro tutmonda, ĝi devas ekstermi la militon kaj la militilojn, se ĝi ne volas esti ekstermata de ili.

SAT-ano[1].

[1] Tiu manuskripto ne havis subskribon: ĉar ni ne plu posedis la akompanleteron, al ni ne estis eble indiki pli precizan subskribon de l' aŭtoro de tiu originale verkita artikolo. — *Red.*



La senlaboruloj en Kanado

En Edmonton, Kanado, 31. decembro 1928 senlaboruloj aranĝis manifestacion. Post kunveno en granda salonego la senlaboruloj elektis delegitojn kaj sendis ilin al la urbestro, por peti laboron. Sed la urbestro malakceptis la peton. Post mallong-daŭra kunveno je 2. januaro la senlaboruloj manifestaciis tra la ĉefa strato de l' urbo milope kaj kantante revoluciajn kantojn renkontiris la urbestron, kiu denove rifuzis helpon. Tiam la manifestaciantoj iris al la Parlamenta palaco kaj tie proklamis sian volon sub la devizo: "Panon kaj laboron!", malgraŭ policaj trupoj laŭte malbenante la kapitalistan sistemon. Post nelonge venis sciigo pri konsento al la senlaborulaj postuloj. Kie estas unueco, tie estas potenco. *Batalanto.*

LA SEKVOJ DE SENDEPENDIĜO

(Daŭrigota. Vidu n-on 235)

Ne havante tiajn organizojn, al kiuj oni povus transdoni "zorgadon" pri laboristoj, la faŝistoj en Litovio komisiis tion senpere al la politika polico. Kaj ĝi uzas jenan taktikon: ĉiujn por ĝi nekonatajn aŭ malfideblajn laboristojn el pli grandaj laborejoj kaj fabrikoj ĝi ordonas maldungi pere de la administrantoj de entreprenoj, kaj reakcepti nur tiujn laboristojn, kiuj alportos de la politika polico atestojn pri fidindeco. Fidind-atestojn la polico donas nur al laboristoj, kiuj promesas liveradi al la polico informojn pri sekretaj organizoj laboristaj kaj ĉefe pri kompartio. Tiele estas forigita el ĉiuj pli grandaj laborejoj kaj entreprenoj la tuta iom pli aktiva parto de laboristoj. En la ceteraj ejoj estas semata grandega malbonmorigo kaj malkonfido de unu al aliaj.

Cetere oni faris la provon fondi kelkajn pure faŝistajn profesiajn unuiĝojn (ĉe fervojistoj kaj preslaboristoj). Sed la provoj donis neniajn rezultojn.

Sekvoj de l' malbona ĉi-jara rikolto devigis la faŝistojn pli serioze zorgi pri la laborista problemo. Tiucele ili fondis porlaboristajn malsanulkasojn, kompreneble faŝist-tendencajn. Tamen indas diri pri ili kelkajn vortojn.

La malsanul-kasoj

La projekto de leĝo pri malsanulkasoj por laboristoj estis liverata ankoraŭ. verŝajne en 1921, al konstitucia parlamento. Tamen tuj post la detruo de l' laboristaj organizoj, unuavice de la sindikatoj, oni ne bezonis rapide proklami leĝon pri malsanulkasoj. Ĝi kuŝis senmove en tirkestoj de parlamentkomisionoj ĝis la jaro 1926. Tiutempe pligrandiĝinta laborista movado devigis ree eltiri tiun ĉi polviĝintan leĝprojekton kaj pridiskuti ĝin en la parlamento. Tamen la faŝista renverso reenŝovis tiun leĝon en la tirkestojn. Nur en 1928 la faŝistoj donacis ĝin post siamaniera "plibonigo" al la laboristoj kiel nekutiman donacon.

Sen klarigo oni povas kompreni, ke tiu ĉi leĝo tuŝas nur tre malgrandan parton da laboristoj. Krom tio oni metas sur la ŝultrojn de l' laboristoj preskaŭ la tutan ŝarĝon de la malsanulkasaj elspezoj. La labordonantoj pagas en la kasojn nur $^{2}/_{3}$ de tio, kion pagas la laboristoj. La ŝtato ne partoprenas en la provizado de l' malsanulkasoj. Tamen la ĉefa kontrolo pri la kas-agado apartenas al la ministerio por internaj aferoj. La pli malaltaj kasorganoj konsistas el $^{2}/_{3}$ reprezentantoj de laboristoj kaj $^{1}/_{3}$ reprezentantoj de labordonantoj.

La plej granda nombro da laboristoj en Litovio estas okupata en terkulturo. Ili ne uzas la leĝon pri malsanulkasoj, kvankam interalie estas notita en la leĝo, ke por ili estas aplikata nedeviga asekuro.

En komenco de decembro 1928 la konsilantaro de unuiĝo de naciistoj (faŝistoj) denove kunsidis por zorgi pri plibonigo de laboristaj kondiĉoj. La efikoj sentiĝis per pli severaj juĝoj pro aparteno al kompartio aŭ disvastigo de ĝia literaturo. Antaŭe oni kondamnis la "kulpulojn" je 15 jaroj da punlaboro. Nun oni kondamnas ilin je morto aŭ je dumviva malliberejo. Sed lastatempe en kelkaj laborejoj okazis strikoj kaj ie la senlaboruloj jam kuraĝis postuli subvenciojn.

Oni "zorgas" pri la kamparanoj

Post la laboristoj, la faŝistoj "ekzorgis" pri la kamparanoj. Unuavice estis zorgata pri la terreformo. Antaŭmilite en Litovio preskaŭ duono da plej bona grundo apartenis al bienposedantoj, kiuj grandparte estis poloj. En vilaĝoj estis sentata grandega manko da grundo.

Dum la mondmilito multaj loĝantoj de Litovio estis forkurintaj en Rusion. Tie ili vidis, kiel radikale la Oktobra revolucio de 1917 solvis la terproblemon.

Dum fondiĝo de l' Litovia ŝtato granda parto de polaj bienposedantoj forkuris en Polion. Iliaj bienoj staris ankoraŭ netuŝitaj, sed ankaŭ ne-prilaboritaj. La senproprigo de bienoj kaj disdivido de l' grundo al vilaĝaj laboristoj kaj al kamparanoj, havantaj malmulte da grundo, fariĝis en Litovio la plej populara devizo de vastaj amasoj. Tiu ĉi fakto devigis la burĝaron kaj riĉan kamparanaron en Litovio, fari praktikajn konkludojn. Volante eviti la sorton de Rusio, tiuj lastaj devis transdoni parton de biengrundo al vilaĝaj laboristoj kaj malriĉaj kamparanoj. Oni eldonis leĝon pri terreformo, laŭ kiu la bienoj estas malgrandigitaj ĝis 80 hektaroj, escepte nur la specimenajn mastrumaĵojn. La pastro A. Ŝmulkŝtis, prezidanto de la partio de kristanaj demokratoj, diris, ke kun la terreformo konsentis eĉ granda parto da pli saĝaj bienposedantoj, ĉar ili komprenis, ke se oni ne volas perdi ĉion, oni devas transdoni parton de la grundo bonvole. "Por poste ĉion ree forpreni..." — tion ne aldonis al siaj paroloj en la fino Ŝmulkŝtis.

Revolucia periodo pasis. Efektive parto de laboristoj kaj malriĉaj kamparanoj ricevis grundon. Sed ili ricevis neniajn helpilojn. Ja nudan teron oni ne mordetos per la dentoj. Se oni havus propraĵ-dokumentojn, oni vendus tiun grundon kaj migrus laŭ la direkto de sia nazo. Sed nun oni devas suferi sur tiu nuda terpeceto kaj fariĝi servutulo de najbaro aŭ bienposedanto.

La faŝistoj eĉ tion prizorgis. La dividon de bienoj ili haltigis. Al ĉiuj novfondiĝantoj[1] ili rapide donis la propraĵ-dokumentojn pri antaŭe ricevita grundo, por ke ĉi tiuj sen iuj malhelpoj povu la ricevitan kampon redoni al tiuj samaj bienposedantoj aŭ al najbaroj — riĉkamparanoj. Sed la lastaj ne petis, ke la malriĉulo bonvolu redoni la grundon; ili postulis, ĉar la protestitaj kambioj de novfondiĝanto jam delonge estis ĉe notario. Nur oni ne povis laŭ ili juĝpostuli la monon, ĉar la novfondiĝanto ne havis propraĵ-dokumentojn.

Speciale por "S-ulo" verkita de T. K. Ellitovigis Esperantistoj.


(Daŭrigota.)

1 Novfondiĝanto = la homoj ricevintaj iom da kampo (de ½—12 hektaroj), dum la terreformado.

LA ŜAMANA MISTERO[1]

En anguloj de jurto[2] estas duonlumo, kaj nur ĝia mezo estas hele lumigita per brulanta lignaĵo. Kontraŭ la pordo, malantaŭ la brullignaĵo, sidas genuflekse la mastro de l' jurto kaj en dekstra flanko de ĝi diservas kamo[3]. Laŭ altajana kutimo la virinoj okupas la dekstran flankon de jurto (rigardante de enirejo) kaj la viroj la maldekstran.

La kamo staras genuflekse. Li estas vestita per blua kaftano, kun falda kolumo, butonumita sur la brusta flanko per grandaj ruĝaj butonoj. Laŭlonge de l' kaftana dorso estas du blankaj tolaj rubandoj. Surkape la kamo havas ĉapon, al kiu malantaŭe estas alkudrita blanka rubando falanta nuken. Per la maldekstra mano li tenas tamburinon ornamitan eksteraflanke per decaj desegnaĵoj, kaj per la dekstra mano li tenas frapilon ornamitan per rubandoj kaj tintantaj metalaj lamenoj. Per samspecaj lamenoj estas ornamita la idolo kun kupraj frunto kaj okuloj enmetita en internon de l' tamburino.



Desegnaĵoj sur la interna flanko de tamburino.

La kamo de tempo al tempo mallaŭte frapante sian tamburinon ion kantas recitative. Li plenumas jam la finparton de l' mistero en la diservo al Ulgeno (bona dio) kaj troviĝas, image, malproksime, sur alta ĉielo, en sfero de "fajra tero", kie loĝas patrino Suno kaj patro Luno. Li preĝas al ili kaj gloras ilin. La kamo ne staras trankvile, sed ĉiam serpentumas sur la loko, rapide turnas sin diversflanken, konvulsie skuas la tamburinon, pro kio kortuŝante sonoras la metalaj lamenoj, kaj de tempo al tempo li blovas kaj kraĉas antaŭ sin. Sed jen la kantado de l' kamo fariĝis iu sovaĝa freneza kriado. Li eksaltas de l' loko kaj tre rapide ekturnas sin ĉirkaŭ la fajroŝtiparo mem. Forte frapante la tamburinon kaj sovaĝe laŭte kriante, la kamo ekflugas al altega ĉielo. De l'

[1] La Ŝamana-mistero estas religia idolana ceremonio, aranĝata en la Altajmontara regiono (Sovetio). La liberpensuloj en tiu regiono devas kontraŭbatali ne nur la kristanismon, sed ankaŭ la ŝamanismon, kiu lasta estas tre multekosta, ĉar oni forbuĉas kiel oferdonon dum la mistero la ĉevalojn, la solan trezoron de l' indiĝenoj.

[2] Loĝejo konusforma.

[3] Altaja nomo de ŝamano (pastro).

ŜPINISTINOJ VENKIS

Dum 1928, pro tre malvigla ekonomia stato kaj terura subpremado, Laborunia movado en Japanio, speciale inter virinoj, progresadis tute ne vigle. Io notinda tamen estis la striko de ŝpinistinoj. Spite tia malesperiga tempo ili venkis. Kvankam oni pensos, ke la strikantoj havis tute ordinarajn postulojn, la venko montras la forton de unuiĝo.

En kia stato vivis ŝpinistinoj en Tokio-Muslinkompanio en la urbeto Kanamaĉi? Tie 1200 gelaboristoj laboras. Inter samfabrikanoj edziĝo estis malpermesata. Se samfabrikanoj edziĝis, ili tuj devis maldungiĝi. Post kiam la geedzoj trapasis la tutan skalon de salajra registro, bonŝanculoj inter ili hazarde ree dungiĝis. Tamen tiam la redungitaj homoj devis fari tute novan kontrakton kun la kompanio. Kaj tiu nova kontrakto absolute ignoris, ĉu oni laboris 5 aŭ 8 jarojn antaŭ sia edz(in)iĝo. Per tio la kompanio evitis plimultigon de pago pro longa servado kaj premion pro daŭra servado kaj ankaŭ malprofiton en efikeco, kiu rezultos pli-malpli de edziniĝo.

800 laboristinoj el la tuta laboristaro loĝis en pensionoj ĝuste kiel birdoj en kaĝoj. En la unua dimanĉo ili neniam havis permeson eliri, eĉ se iliaj gepatroj vizitus ilin. La kompaniaj oficistoj diris, ke en la unua dimanĉo laboristinoj havas monon, ricevinte pagon antaŭ ne longe, kaj estas danĝero pri ilia ebla forkuro. Oni elmetis ja la laboristinojn al tia mizera stato, kiu kaŭzas sufiĉan timon kaj suspektemon pri eventuala forkuro. Eĉ en aliaj dimanĉoj krom la unua dimanĉo ili estis ne tute liberaj. Se iu laboristino revenus post la dudek-dua horo vespere en dimanĉo al ŝiaj tutaj samĉambranoj estus malpermesate eliri dum la tuta monato. Al ili do estis neeble senĝene vidi eĉ kinon en libertago. La kompanianoj diris, ke la kompanio estas tre severa rilate al eliro de laboristinoj pro tio, ke ĝi volas gardi moralecon de la junulinoj. Tiu bela kialo maskis ilian timon, ke la laboristinoj povos kontakti kun nova ideo en la ekstera mondo. Kvankam la kompanioj ne bezonas fari elspezon lasante eliri laboristinojn, ĉiuj kompanioj estas same severaj rilate al la eliro-demando pro la sama kialo.



Sufervivo de infanoj en Japanio

La ŝpinistinoj en la Kanamaĉi-fabriko elektis siajn reprezentantojn, kiuj prezentis petskribon en la 25-a de junio. Iliaj petoj estis; 1. libereco pri edziniĝo; 2. libereco pri eliro; 3. deĵorigo de kuracistoj dum nokto; 4. Honesta observo pri perioda plimultigo de pago. Dum 3 tagoj ili kun la oficistoj de la kompanio intertraktis. Tamen la kompania flanko montris neniom da sincereco al tiuj tre pravaj petoj. La obstinega sintenado de l' kompania flanko indignigis la tutan laboristinaron, kaj ĉi tiuj je la 6-a horo en la mateno de l' 29-a tago okazigis kongreson, kaj la ekscititaj laboristinoj ĉiuj elflugis el la fabriko. La tute konsternita kompania flanko nenion povis fari kontraŭ la forta aro en tiu frumateno.

La tuta laboristinaro elfluginta el la pensionoj tuj kolektiĝis kaj manifestaciis antaŭ la pensiono de virlaboristoj. Post 3 horoj terure konsternitaj policistoj alkuregis por ordoni disiĝon. Kelkdeko da policistoj kune kun kompanianoj repelis la kontraŭstarantajn laboristinojn ĉiujn en iliajn pensionojn.

La enpelitaj laboristinoj eliris sur la tegmentojn. Svingante subite faritajn ruĝflagojn, ili responde kantadis al la ruĝflagoj de sia helpantaro, kiu malsupre staris antaŭ la pensionoj.

Baldaŭ tamen policistoj malsupren trenis la laboristinojn de la tegmentoj. La fenestroj estis najlataj, kaj ŝirmiloj estis pendigataj. Tamen ili ne atentis fenestrojn de l' necesejoj, el kiuj subite aperis manoj svingantaj naztukojn, kaj la helpantaro ekstera kantadis per sia tuta forto. La fenestretoj ankaŭ baldaŭ fermiĝis. La kompania flanko plej severe gardadis. Komuniko kun eksteruloj fariĝis absolute neebla. Riskantaj bravuloj kun afiŝetoj enŝteliĝis en la pensionoj dum la nokto, sed ili ĉiuj kaptiĝis. La kompania flanko provis laborigi la laboristinojn; kontraŭ unuopa laboristino ploranta kaj kontraŭstaranta oficistoj kaj policistoj kelkope provis elatingi devigan laboron.

La kompania flanko venigis rakontistojn kaj profesiajn amuzistojn por trompe mildigi la laboristinojn.

La gvidantaro kaj helpantaro ekster la pensionoj suferis de ekstrema maltrankvilo. Ili tute ne sciis kion fari. Eksterpensionaninoj apenaŭ povis eniri la manĝoĉambron nur por manĝi; ĉiun el ili akompanis gardisto, kaj ili povis nek paroli nek enĵeti afiŝetojn. Eĉ paperetoj kaŝitaj en ies lumbtuko estis komike malkovrataj.

La unua tago de julio estis dimanĉo, en kiu multaj subtenantoj are alvenis al tiu urbeto Kanamaĉi. Al ilia entuziasma kantado kaj manifestacio neniu respondo sekvis el la interno de la pensionoj. Dume la laboristinoj daŭrigis sian intertraktadon kun la kompanio. La kompania flanko vidante tre firman unuiĝon de la laboristinaro, rapidigis tujan solvon de la problemo.

Je la 1.30 noktmeze la laboristinaro akiris perfektan venkon.

Kia forto estas unuiĝo! En la daŭro de 2½ tagoj de kiam komuniko kun eksteranoj estis absolute neebligita, 800 laboristinoj daŭrigis sian unuiĝon kaj ne eĉ unu perfidulino aperis! En la unua nokto de tiu striko noktlaboristinoj, trompite de propagandaĉo de la kompanio, estis ĉiuj pretaj por eklabori. Tiumomente taglaboristinoj sciiĝintaj tion tuj alkuregis kaj senmaskigis ilian tutan preparon. Kiam unu parto ŝanceliĝis, aliaj ĉiam instigis kaj kuraĝigis ilin kaj tenis sian unuiĝon kompleta. Tute sen gvido de viroj, la laboristinoj per si mem daŭrigis sian unuiĝon kaj trovis ĉiujn siajn postulojn plenumitaj.

Eljapanigis 4976.

Suno li ĉiam altenleviĝas celante la Polusan stelon. Longe li flugas, longe freneze turnas sin sur loko, gestante kaj saltante... longe kaj obstine li frapadas raŭke blekantan tamburinon, longe ion kriadas... Jen ĉio ĉesis. La kamo denove staras genuflekse kaj denove trankvile kantas ion akompanate de l' sonoro de lamenoj...

Antaŭlasta akto de l' mistero: la kamo estas sur la Polusa stelo (altinkazik = ora paliso). Tie staras granda ora paliso, al kiu la kamo alligas la oferbuĉotan ĉevalon. Estas proksime de tie Ulgeno, la bona dio, sed la kamo ne venos por lin viziti, ĉar Ulgeno neniun lasas eniri sian loĝejon. Ulgeno nur sendas renkonten al la kamo siajn servantojn, diaĵojn, kiuj kondukas la ĉevalon alligitan de l' kamo al la Ulgena loĝejo. Malgraŭ la neatingeblo la kamo interparolas kun Ulgeno. La kamo dankas al li pro ĉiuj bonoj ricevitaj de l' mastro de jurto kaj petas lin esti ĉiam tiom favora, li petas donaci al tiu, por kiu li diservas, multajn brutojn, multajn infanojn. Longe preĝas la kamo, kaj oni atentas lin.

Denove la kamo eksaltas de l' loko, saltas antaŭ sin kaj forte frapante la tamburinon krias imitante la kriadon de l' anseroj. Li vokas paron de siaj nigraj anseroj, kiuj devas mallevi lin returnen al la tero. Jen aperas la anseroj. Komenciĝas flugo malsupren. La kamo en plej alta grado de furiozo. Kvazaŭ turbo li turnadas sin sur loko, konvulsie gestante kantas li ion per raŭka voĉo, hurligas li sian tamburinon kaj fine subite falas teren svenante. La mistero finiĝis.

A. Lapustin (10 373), Ulala.

SENNACIULA SCIENC-KULTURA PAĜO

Sub la kontrolo de Scienc-Kultura (Akademia) Sekcio de SAT. Redakci-adreso: Dim. Snejko, Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio)

Paŝon post paŝo . . .

Denove nia Paĝo! Jam en ĝi ni devos komenci prepari nin por okazonta sekci-kunsido dum nia 9-a en Leipzig. De hodiaŭ ni malfermas niajn paĝojn por diversaj proponoj, diskutotaj dum nia sekci-kunsido. Lasttempe pli da materialo alvenas por nia Paĝo, eĉ loko mankas por ĉion presigi. Ni uzos parton en "La Nova Epoko", parton en TEPS-Bulteno, se nia ŝatata K-do Boubou konsentos.

Ni alvokas niajn kunlaborantojn, landkonsulojn k ĉiujn aliajn sekcianojn sendi al ni materialon pri ilia laboro kaj samtempe ion por S. S.-K. P. Kultura kroniko el ĉiuj landoj estas bezonata. *Red.*

La franca avangarda Studentaro

(vidu n-ojn 218, 223 k 233)

La unueco de tendencoj en la kontraŭfaŝisma batalo. Eble la leganta K-do sin demandos, ĉe kiu tendenco avangarda agitas kaj batalas la studentaro de UFE? Tiu juna kaj forta movado estas esence unueca. Naskita de la stultaj tumultoj kaj bruegaj fanfaronoj de la du dekstraj grupoj de rojalistaj kaj junpatriotaj studentoj (kiuj malgraŭ ŝajna interkonflikto unuiĝas por konsistigi la universitatan faŝismon) —, UFE batalas sur unueca starbazo kontraŭfaŝisma. Tiu starbazo estas ne nur bontaktika, ĝi estas ankaŭ deviga pro la forta pozicio de l' faŝismo en la Latina kvartalo (tiel oni nomas la kvinan urbdistrikton de Parizo, kie loĝas la studentaro kaj staras la Universitato). Ĉiutendencaj avangarduloj ne estos tro multaj por purigi la "Aŭgiasstalojn" de l' universitata faŝismo. Sed tiuj sagacaj junuloj, kiuj en ĉiuj sciencaj fakoj elstudis, ke nenie ekzistas neŭtrala nulo, kiuj en ĉiuj sciencaj fakoj elstudis, ke nenie ekzistas neŭtrala nulo, kiuj ankoraŭ ne estis influataj de la demokratismaj manovradoj en nia respublika politiko, ankoraŭ ne scias "naĝi inter du malsamaj akvoj" t. e. turniĝi oportune jen dekstren, jen maldekstren laŭ la politikaj fluoj kaj prezenti kiel antikva dio "Janus" duoblan vizaĝon.

Antaŭ la stultega maldeco de faŝistaj studentoj kontraŭ profesoroj Langevin kaj Prenant (kies kursojn ili sabotis pro la nura motivo, ke tiuj altestimataj scienculoj kaj sistemo), la kontraŭfaŝisma studentaro povas nur alpreni firman revolucieman opinion.

Kiam la faŝistaj medicinaj studentoj provis saboti la kurson de profesoro Champy (Ŝampi) antaŭ kelkaj monatoj, la studentoj de UFE restarigis la ordon en la Universitato spite la bastonegoj kaj atakiloj de tiuj rojalistaj kaj patriotaĉaj moŝtoj. La 21-an de marto 1928 UFE organizis majstre kunvenegon kontraŭfaŝisman, en kiu partoprenis 300 studentoj kaj ĉiutendencaj oratoroj. Tiutage la kontraŭfaŝistaj studentoj 'estris' la bulvardon dank' al ŝirmo de defendaj studentaj grupoj. Dum la preparo de la kunvenego, 50 faŝistoj atakis 6 K-dojn disdonintaj propagandilojn — sed en la kunvena vespero la faŝistaj bandoj malkuraĝe forkuris en la subterajn staciojn de "Metro" (subtera rapida tramo).

Malgraŭ la tendenc-unueco estas facile rimarkeble, ke la reformista (socialista aŭ sindikatista) tendenco ne tre emas partopreni la agadon de la avangarda studentaro. Krom la studentaj oratoroj, en la kontraŭfaŝista kunveno ĉefe parolis gvidantoj de ruĝa federacio de Instruistoj kaj de Edukintern (Internacio de l' Eduklaboristoj), el kiuj kelkaj estas eks-studentoj. Sekretario de Nacia Sindikato Instruista (reformista) K-do Glay (Glä), invitita, ne venis kaj anstataŭigis sin de K-do Blutte (Blüt), kiu apartenas samtempe al Ruĝa Federacio Instruista kaj al Nacia Sindikato. La sintenado de reformistoj al studenta movado tre similas ilian sintenadon al jun-instruista federacio. Reformistoj profunde sentas, ke junuloj sin direktas al revolucia tendenco kaj reformistoj timas, ke per sia partopreno en tiuj tendenc-unuecaj organizoj junulaj ili helpus nur al la t. n. "ekstremismo" (revoluciismo).

Lukto kontraŭ deviga militistigo de studentoj. La socia batalo de l' avangardaj studentoj baziĝas ne nur sur kontraŭfaŝisma agado, sed ankaŭ sur kontraŭmilitemo per la lukto kontraŭ la enkonduko de militarista instruado en la altaj lernejoj (porinstruistaj, gimnaziaj, universitataj . . .). Oni scias, ke la tre "pacema" franca respubliko, malgraŭ multaj promesoj redukti ĝis unujareco la soldatservo-daŭron, ankoraŭ konservas 18 monatojn la junulojn en siaj kazernoj. Sed speciala dekreto permesas al instruitaj junuloj (instruistoj, studentoj, profesoroj) resti nur unu jaron, se, per la speciala militista instruado donita de oficiroj kaj suboficiroj en la lernejoj mem, ili sukcesas akiri militinstruan diplomon, kiu ebligos, ke ili estu rezerv-oficiroj kaj servu nur unu jaron. La avangardaj studentoj el UFE postulas egalecon kun aliaj soldatoj ne pro tio, ke ili deziras militservi pli longe, sed ĉar ili malŝatas militarismon. Sufiĉas vidi la militistojn en la kazernoj, ili restu for de la lernejoj.

Resume. Resume, oni povas eltrovi en la daŭre kreskanta movado de l' avangardaj studentoj kvar etapojn, kiuj signas la progresojn:

1. Ĝis 1925, la kontraŭfaŝistaj studentoj unuope kaj disigite agadis en la oficialaj "Ĝeneralaj Asocioj Studentaj".
2. Post 1925, la avangardaj studentoj kuniĝas en "Ĝeneralaj Unuiĝoj" kaj komencas la grupan lukton.
3. De 1927, post la fonda kongreso de UFE, ĉiufakaj studentoj federaciiĝintaj komencas propagandon al la studentamaso kaj starigas ĝeneralan starbazon kaj ĉiufakajn postulojn.
4. En 1928 la studenta movado ampleksiĝas al la tuta lerneja intelekta junularo en ĉiugrada instruado kaj organizas la kunligojn kun la klasbatalaj sindikatoj kaj tiel firme sin lokas meze de la proletara sindikatismo.

M. Boubou.

BALDAŬ ESTOS ELĈERPITA

la eldono de l'



Protokolaro de la 8-a SAT-Kongreso

en Göteborg.

Ĝi enhavas ankaŭ la tekston de la Programprojekto, nun pridiskutata en "S-ulo". Ĉiu aktiva SAT-ano, kiu ankoraŭ ne posedas la ampleksan k interesegan broŝuron, aĉetu ĝin senprokraste, ĉar ne restas multaj ekzempleroj!

64 pĝ. Prezo nur 0,50 mk. g.

Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

EL VIVO KAJ SCIENCO

Budhologia instituto

estis malfermata ĉe Leningrada akademio de sciencoj sub gvido de prof. Ŝĉerbacki. Al scienca konsilantaro de l' instituto apartenas reprezentantoj de Francio, Germanio, Japanio, Hindio kaj Mongolio. La instituto preparas la unuan enciklopedion pri budhismo kaj kongreson en Leningrad. Homo (2921).

Malsano de vitro kaj ĝiaj sekvoj

Novepoka kulturo postulas nuntempe, ke estintaj memoraĵoj estu konservataj por la estonto. Estis privataj kolektantoj, kiuj donis la unuan iniciaton. Poste disvastiĝis la kompreno pri la fondado de kolektoj publike alireblaj en ĉiuj kulturŝtatoj, kaj ne nur en iliaj ĉefurboj, sed ankaŭ en provincurboj. Necesas, ke oni havu perfektan scion koncerne la konservadon de ĉiuj antikvaĵoj; tamen tiuj scioj estas en multaj okazoj ankoraŭ ne kompletaj. Ekzemple oni povas diri tion koncerne la konservadon de malsana vitro.

Vitromalsano montriĝas jene: Sur glaso, pokalo aŭ tabulvitro unue ekzantemas forte malbonodora ŝvito. La glaso, pokalo aŭ tabulvitro perdas sian brilon, malklariĝas; poste oni rimarkas sur la plato subtilajn, pli malpli densajn krevaĵetojn similajn al araneaĵo. Ĉi tiuj krevaĵetoj profundiĝas, post tio komencas forfaladi; nove dekovrita plato subiĝas al la sama procedo, ĝis la vitro tute disfalas.

La scienco argumentas: Vitro riĉa je alkalioj eliminas, influite de akvo, la krevaĵetojn kaj acidon karbonikan. Poste restanta acido silicia kun teraj kvarcitaĵoj en skvametoj forfalas. La procedo ĉiam akuta daŭras sur malmola vitro malriĉa je alkalioj kelkajn jarojn, sed sur mola ekzemple venecia vitro ĝi daŭras kaj finiĝas rapide dum

kelkaj monatoj. Facetita kaj maldika vitro subiĝas al tiu malsano facile. La ĉeĥa vitro, kiu estas pli riĉa je acidoj saliciaj, rezistas.

Glasoj kaj pokaloj ŝirmataj per kovrilo estas interne konservataj. Tio pruvas, ke kovrado ŝirmas la internon kaj samtempe malhelpas infektadon. Estas pruvite, ke tiu ĉi malsano efikas infekteme sur la apude starantajn glasojn kaj pokalojn kaj eĉ trafas tabulvitron.

Pri la vitromalsano, vastaj rondoj da kolektantoj ne havis scion, ĝis la internacia muzea kongreso en Kopenhago je la fino de la 19-a jarcento kaj alia en la jaro 1903 en Berlino. La kongreso en Kopenhago komisiis al la Industria Muzeo en Reichenberg (Ĉeĥoslovakio) la studadon pri la vitromalsano. La bezonatan materialon donis por tiu celo la Industria Muzeo de Berlino kaj artaj kolektoj de Kopenhago. Nordbohema Industria Muzeo en Reichenberg kunlaboris kun tiea kemia laboratorio kaj klopodis klarigi la gravan malsanon. Samtempe ĝi dediĉis detalan broŝuron pri siaj rezultoj, eĉ pri tiuj de aliaj fakuloj-specialistoj, al la internacia kongreso, kiu estis aranĝita en la jaro 1903 de la Industria Muzeo de Berlino. S-ro G. E. Pazaurek, gardisto en la Reichenberga muzeo, konata specialisto pri utiligata vitro, estas aŭtoro de tiu ĉi broŝuro, kiu argumentas, ke oni ne povas malhelpi la vitromalsanon. Tamen li rekomendas forigi malsanan vitron el la kolekto aŭ froti ĝin per senakva lako.

La Urba Muzeo en České Budêjovice (Ĉeĥoslovakio), kiun sciigis s-ro Pazaurek pri vitromalsano ekkonis, ke en ĝia kolekto de glasoj kaj pokaloj troviĝas kvar malsanaj pokaloj el 17-a kaj 18-a jarcentoj. Poste la "renovigisto" kaj administranto de nomita muzeo komencis (en 1906) siajn provojn, radikale batali kontraŭ la pereiga malsano. Post longaj sendormaj noktoj li sukcesis eltrovi preparaĵon, kiu malhelpas la disvastigon de la malsano. Lia invento estas plej perfekta kaj la unua en la mondo, kiu garantias la detruon kaj forigon de l' pereiga vitromalsano. Li ankaŭ estas la sola, kiu faris inventon kontraŭ la stanpesto. Lia preparaĵo eĉ imunigas la sanajn glasojn, pokalojn kaj tabulvitron kontraŭ la vitromalsano.

Fakuloj-specialistoj, kiuj interesiĝas pri tiu ĉi invento, turnu sin (skribante n u r en esperanto kaj aldonante respond-kuponon) al: J o s. P l o s s, Č e s k é B u d ê j o v i c e, Skuherského ul. 63, Ĉeĥoslovakio. *SAT-ano 4080.*

NIA ANGULETO

Ne forgesu havigi al la red. interesan artikolon!

12 448. Via art. aperos en sekv. SSKP. Kunlaboro via estas dezirata.

A. Penĉik. Vian art. ni esperas uzi en TEPS-bulteno. Daŭrigu vian kunlaboron.

M. Starr. Kial do vi silentas?

3905. — Pro tro speciala karaktero de via artik. mi esperas ĝin uzi en I. M. R. (Studenta fako). Daŭrigu!

L. Bergiers. Jam longe ni ne ricevas resp. al niaj PK k leteroj. Informu nin pri vi mem.

DISKUTEJO

La "mikrokosma" Sennaciismo

II

(Fino de l' artik. el la antaŭa n-ro)

Nun mi pli detale pritraktos la doktrinon de K. Lanti pri S e n n a c i i s m o.

Laŭ opinio de K. Lanti, "neniam la problemo pri liberiĝo de l' proletaro estis starigata je sennacieca vidpunkto". "Nur la praktikado de esperanto povis ebligi tielan stariĝon de la problemo." Ĉi-tio estas tute nevera.

Ligo de lingva komuneco inter ekspluatatoj kaj ekspluatantoj estas tre granda, sed ĝi fariĝas tre malforta antaŭ atako de ekonomiaj kondiĉoj, kiuj puŝas klason kontraŭ klaso. La monda lingva disiĝeco de proletaro estas grandega, sed ĝi estas multe pli malforta ol ekonomiaj faktoroj, kiuj diktas, kiel la fera leĝo, unuiĝon tutmondan de proletaro. Oni do memoru, ke la decidanta faktoro en ĉiuj gradoj de proleta tutmonda unuiĝo estas la ekonomio, sed ne lingvo. Kaj ankaŭ la evoluo de lingvo mem dependas de la ekonomio.

Foresto de lingvo internacia kaj poste nekompreno de signifo k valoro de esperanto ne malhelpis al revoluciaj proletaj ideologoj montri v e r e s e n n a c i e c a n l i n i o n de proletara politiko k de homara evoluo. Ankoraŭ Marks skribis: "Oni riproĉas al la komunistoj, ke ili volas forigi la patrolandon, la naciecon. La laboristoj ne havas patrolandon." En siaj "Rimarkoj" al la projekto de SAT-programo K. Lanti, citante Jareŝon, asertas, ke ĉi-tio estis nur paradokso de Marks. Pruvu ĉi-tion K. Lanti[7]!

Lenin, ĉi-tiu plej granda sennaciulo de nia epoko, komprenas sub la vorto "internacia" "kunfandiĝon de ĉiuj nacioj en la plej supera unueco"*. Kaj, por esti pli ĝusta, li al la koncepto "kunfandiĝo" kontraŭstarigas la koncepton "kunproksimiĝo": "La celo de l' socialismo estas ne nur neniigi dispartiĝecon de l' homaro per etaj regnoj, ne nur kunproksimigi naciojn, sed ankaŭ ilin kunfandigi."

Kaj ni prenu ankaŭ Kautski'n de l' epoko, kiam li ankoraŭ estis revolucia marksisto, ĉu ne diras li ankaŭ pri kunfandiĝo de nacioj kaj pri universala lingvo[8]?

La ekzemploj k citoj sufiĉas por montri, ke ĉe revoluciaj marksistoj la koncepto "internacia" ĉiam egalas "sennacia". Tial pravas la esperantistoj, kiuj distingas en la vorto "internacia" du konceptojn kaj tradukas la vorton per la 2 vortoj: internacia k sennacia.

Laŭ opinio de K-do Lanti la esperanta mondeto estas "ia m i k r o k o s m o, sur kiu povis naskiĝi la ideo pri sennaciismo." Li daŭrigas: "Troviĝis anticipemaj spiritoj por prezenti al si bildon de tutmonda socio mastrumata laŭ raciaj principoj, socio en kiu ne ekzistus landlimoj k estus uzata kiel kulturlingvo nur esperanto." Tia estas la vere "mikrokosma" teorio de K-do Lanti, kiu penas deŝiri sennaciismon de ĝenerala tutmonda proleta movado kaj fari el ĝi iun veran "mikrokosmon". Tiu estonta tutmonda socio, la bildon de kiu prezentas al si la "anticipema spirito" de K-do Lanti, jam delonge estas "anticipita" de la plej grandaj proletaj ideologoj. Ili povis erari pri la vojoj, per kiuj evoluos lingvo tutmonda, sed ili bone antaŭvidis ĝin en estonta socio tutmonda[8].

Substrekante kontraŭe al K-do Lanti la "makrokosman" karakteron de la tutmonda sennaciisma movado[9], mi tute ne

* Ĉi-tie kaj sube mi citas.

[7] *Mi ne povas ne protesti kontraŭ la argumentmaniero de K-do Sp. En la* Protokolaro *(pĝ. 54) oni povas legi: "Li t. e. Ĵores, asertis" ktp. Mi akceptas respondecon nur pri miaj diroj, ne pri tiuj de Ĵores. Sed estas fakto, ke la fama franca oratoro havis tiun opinion k jen estas, K-do Sp., la de vi petita pruvo:*

"Kiam la Komunista Manifesto *de Marks k Engels eldiris, en 1847, la faman frazon tiel ofte ripetatan k ĉiusence ekspluatatan: 'La laboristoj ne havas patrion', tio estis nur pasia pikparolo, PARADOKSA (la substreko estas de mi. E. L.) rerespondo, k cetere malbonveninta, rebate al la polemiko de la burĝaj patriotoj, kiuj denuncis la komunismon kiel patridetruan. Cetere, Marks mem rapidis korekti k limigi la sencon de sia formulo. Li tuj aldonas: 'Per tio, ke la proletaro devas unuavice konkiri al si la politikan regadon, levi sin al nacia klaso, starigi sin kiel nacion, ĝi estas mem ankoraŭ nacia, kvankam tute ne en la senco de l' burĝaro:*

"Tio estas subtiloj sufiĉe malklaraj k sufiĉe vanaj. Kiel la proletaro povus starigi sin en nacion, se la nacio ne jam ekzistus k ne havus kun ĝi vivantajn rilatojn? Kaj se la Manifesto *volas simple diri, ke klaso ne havas patrion, tiom longe, kiom ĝi ne plene regas la patrion, tiom longe, kiom ĝi ne konkiris la tutan politikan potencon, ĝi devas deklari, ke dum la tuta periodo de la malnova monarkio, depost la timema starigo de Komunumoj ĝis la franca Revolucio: "La burĝoj ne havas patrion." (J. Ĵores,* La Nova Armeo, *pĝ. 436—437.)*

Mi povus daŭrigi la citadon; Ĵores ja dediĉas 30 paĝojn por pritrakti la demandon k pruvi, ke oni malĝuste komprenigas la penson de Marks, citante sen ia klarigo la faman frazon: "La proletoj ne havas patrion."

[8] *Pri tiu punkto oni bonvolu legi aŭ relegi la artikolon de* Herezulo *en la n-o 233 de "S-ulo".*

[9] *Aŭ la vortoj havas difinitan sencon, aŭ ĉiu povas laŭplaĉe doni al ili specialan sencon. Se oni konsentas, ke la vortoj havas difinitan sencon, laŭ kiu ĉiu serioza verkisto devas ilin uzi, ni vidu ĉu K-do Sp. rajtas paroli pri ekzisto de* makrokosma *sennaci*isma movado. *Laŭ mia scio ISMO rilatas al doktrino, al sistemo, al ia kutima pensaŭ agmaniero. En "La Laborista Esperantismo", mi diris: "fakto estas, ke ĉiuj internaciaj kongresoj de la plej maldekstraj laboristaj organizoj, ĉu politikaj, ĉu sindikataj, ĉiam sin deklaris por la "liberiĝo de subpremataj popoloj", por la sendependeco de l' nacioj ktp. Neniam la problemo pri liberiĝo de l' Proletaro estis starigata je sennacieca vidpunkto." Jes, tio estas fakto, kiun nei ne povas ĉiu ajn informita homo. Aliflanke, en ĉiuj laboristaj gazetoj, ĉu anarkistaj, ĉu*

malpligrandigas la signifon en ĝi de esperanto k de esperanta laborista movado. La potenca kreskado de sennacieca mondkompreno ĉe la laborista klaso estas en la tuta mondo stimulata de la ekonomia evoluo en la flankon de tutmonda unueco. Same tia sennacieca konscio[10] de laboristaro naskas neceson de la lingvo internacia, kaj ne kontraŭe, kiel opinias K-do Lanti. La internacia lingvo, aperinte ĉe sennaciuloj, ankoraŭ plifirmigas ilian sennaciecan konscion. La internacia lingvo ĉe internaciuloj akcelas pli rapidan aliformiĝon de ili en sennaciulojn. Same en tio estas la grandega rolo k signifo de la helpa lingvo internacia kaj sekve de SAT dum nia epoko.

Laboron de sennaciuloj, laŭ esenco profunde politikan, K-do Lanti rekomendas fari nur inter esperantistoj: "ili (sennaciuloj) propagandas nur inter la esperantistoj. Ili ja opinias, ke propagandi sennaciismon al malsamlingvanoj estus... malsaĝe[11]". Sed miaopinie sin enŝlosi nur en la vicoj de esperantistoj nia epoke signifas formiĝi en sekton[12]. Sennacieca laboro devas kunfandiĝi k kunfandiĝas kun la ĝenerala politika laboro de l' laborista klaso ĉefe per ĝiaj revoluciaj partioj. Esperanto ĉe proletoj ĉiam k dum ĉiaj cirkonstancoj devas resti nur rimedo. Ĉiuj provoj aliformigi ĝin je standardo de ideologia luktado aŭ je signo de iu tendenco estas tre malutilaj kaj danĝeraj.

K-do Lanti penas kaŝi la danĝeron per sia "supertendenceco". Li diras proksimume jenon: se sennaciismo koincidas kun la vojo de l' homara evoluo, — bone; se ne, — "nu, la estontaj historiistoj simple parolos pri la sennaciuloj, kiel pri revuloj, utopiistoj": "ilia agado neniel povas ĝeni en la laborista movado, ĉar ili propagandas nur inter la esperantistoj". Unuvorte, antaŭ ni estas penado kontentigadi sian propagandemon kun nenia samtempa malagrablaĵo por iu ajn. Tia "supertendenceco" egalas nur absolutan sentendencecon! Ĝi nur montras tiun senelirejon, kiun trafigis K-don Lanti lia teorio de nurperesperanta, "mikrokosma", kiel li mem diras, sennaciismo.

La revolucia mondkompreno de la laborista klaso, ĉiam pli k pli sennaciisma laŭ sia esenco, estas same tia bazo, sur kiu elkreskas, disvastiĝas k fine venkos la tutmonda, komence helpa k poste sola, lingvo. Ĉiu peno, kontraŭe, starigi sur la unuan planon la lingvon mem estas malutila speco de la lingva fetiĉismo. *E. Spiridoviĉ (3712).*

FINA RIMARKO. — Intencinte fari nur kelkajn rimarketojn, mi bedaŭrinde konstatas, ke ili ampleksiĝis pli ol intencite. Kaj tamen mi plene konscias, ke mi ne diris eĉ la kvaronon el ĉio direnda. Mi tamen ne volas unufoje trouzi la kolonojn de nia gazeto k nur petas la legantojn, ke ili kompreneme legu aŭ relegu "La Laborista Esperantismo" k tiel akiru mem propran opinion. Se ili serioze pripensos la demandon, mi ne dubas, ke ili alvenos al tiu konkludo, ke ne mi, sed K-do Sp. ekmarŝis sur senelireja vojo. Diri, ke esp-o estas "komence" helpa lingvo, tio havas nenian signifon, se oni ne konsentas kun la neŭtraluloj, nome, ke esp-o ne celas forigi la naciajn lingvojn. Fakte, ĉiu lingvo estas helpa. Kaj, laŭ mia kompreno, konscia k konsekvenca sennaciulo devas helpi sin per la artefarita lingvo en sia batalo sur la kultura kampo por neniigi ĉion naciecan. Por mi esp-o estas nur ilo*; tion mi jam delonge k plurfoje diris. La riproĉo de K-do Sp. estas do senmotiva, kiam li diras, ke mi faras el la lingvo fetiĉon. Sed malatenti tiun potencan ilon, kiel faris k ankoraŭ nuntempe faras preskaŭ ĉiuj gvidantoj de la laboristaj organizoj, ne donas al K-do Sp. la rajton aserti, ke ili tamen estas sennaciuloj. Por mi la sintenado de tiuj gvidantoj similas kvazaŭ ili malatentus fervojojn, aŭtomobilojn, aviadilojn k similajn artefaritaĵojn. Kaj ĉe tia konstato oni demandas sin, per kia miraklo esp-o povus fariĝi la nure sola lingvo, kiel profetas K-do Sp.*

Finante mi rimarkigu, ke la ĉefa demando en tiu diskutado ne estas decidi, ĉu la sennaciisma tendenco, pri kiu mi parolis, sin bazas aŭ ne sur ĝustaj principoj, sed ĉu ĝi rajtas ekzisti en SAT k ĉu mi pravis aŭ ne parolante pri ĝia ekzisto en mia verketo.

E. L.

---

komunistaj, ĉu socialistaj, oni senĉese povas legi artikolojn k alvokojn por la "sendependeco" de nacioj, por restarigo aŭ eĉ kreo de naciaj kulturoj k. s. Ĉu do, ĉe tia konstato, oni povas paroli pri sennaciisma movado, ekster la tendenco, kiu kelkfoje montriĝis, k eĉ tre timeme, en nia SAT-movado per artikoloj en "S-ulo"? Mi asertas, ke ne.

Se K-do Sp. parolus pri sennaciiĝa historia procezo, mi volonte konsentus kun li. Ja, feliĉe la senĉese malvolviĝanta tekniko laboras al la sennaciigo de nia planedo; ĝi kreas la objektivajn kondiĉojn necesajn, por ke povu disvastiĝi la sennaciismo. Ekzistas sennaciiĝa movado, sed ne la sennaciisma, pri kiu parolas K-do Sp. Mia sennaciismo estas ja "mikrokosma", sed tiu de nia K-do estas absolute mita.

[10] *La "sennacieca konscio" de la laboristaro estas ankaŭ mito, kiu ekzistas nur en la cerbo de K-do Sp. Fakto estas, bedaŭrinde, ke la laboristaro en sia plej granda parto estas naciema, patriota. Kaj kio estas plej grava k danĝera, tio estas, ke tiu naciemo estas ofte senkonscia. En la jaro 1914, unu tago antaŭ la militeksplodo, ĉiu sindikatano, ĉiu partiano ankaŭ konfesis internaciismon k kelkaj eĉ senpatriotecon, sed ĉe la unuaj tamburbatoj, ili enviciĝis en regimentoj k "heroe" batalis por defendi "sian" landon. Kaj mil signoj montras al ĉiu observema persono, ke la hodiaŭa spirito-stato de la amaso restas la sama. Objektivaj kondiĉoj por starigo de sennacieca socio jam ekzistas; kio ĉefe malhelpas, estas la subjektivaj fortoj, la ideologia superstrukturo rezultanta el formortinta ekonomia stato. Por detrui tiun ideologian superstrukturon, ne ekzistas laŭ mi pli taŭga rimedo ol la uzado k aplikado de artefarita lingvo, tial mi kelkfoje diris, ke la gvidantoj de la laboristaj organizoj perfidas la interesojn de l' proletaro, malzorgante la lingvan problemon. Sed por K-do Sp. tia malzorgo ŝajne tute ne gravas.*

[11] *Mi diris: "Ili ja opinias (la sennaciuloj), ke propagandi sennaciismon al malsamlingvanoj estus same malsaĝe kiel instrui beletristikon al analfabetoj."*

[12] *Estas ĝuste por eviti tian sektiĝon, ke mi kontraŭdiras al la enprogramigo de la sennaciismo. Oni nepre ne forgesu, ke, laŭ mia kompreno pri la demando, se ĉiu sennaciulo devas esti SAT-ano, ne ĉiu SAT-ano estas devigata konfesi sennaciismon.*

EL NIA LETERARO

K-do el Nancy (Francio) skribas al ni: "Ne sen intereso mi legis la sciigon de K-do Sidorov el Rostov (vidu n-on *232*); ne sen respekto mi restas antaŭ la kuraĝa ago kaj amo al scienco de la civitano Ŝĉeglov. Tamen ŝajnas al mi, ke alilande ekzistas aliaj herooj, se ne pli grandaj, almenaŭ egalaj, suferantaj pro kaŭzoj egale noblaj kiel tiu de la scienco kaj, bedaŭrinde, ili restas nekonataj de la proletaro.

Ekrigardu blankterorajn landojn — Bulgarion, Rumanion, Hungarion — kie la K-doj ĵetitaj en burĝajn malliberejojn malsat- kaj soif-strikas por defendi siajn rajtojn. Kaj estis multaj, kiuj mortis strikante: mi citu K-don Maks Goldstein, kondamnita al ĝismorta punlaboro post atenco en rumana senato, kiu glore mortis post 7-semajna striko. Ni citu pli freŝdatan okazon: K-do Dobrogeanu-Gherea strikas (malsato kaj soifo) depost 27. januaro; lastan sciigon mi havis de 3. marto, kiam li kuraĝe daŭrigis. Kaŭzo de la striko — li volis esti juĝata en libero kaj ne de militistaj juĝistoj.

Domaĝe nur, ke la burĝaj sciencistoj ne konscias sian devon: malliberulo nenian rajton havas pri sia vivo! Ili povas almenaŭ eksperimenti per tiu senfortigita korpo. Sed ili pli rapide klopodas senkulpigi la militistojn-mortigantojn. — Kiam la komandanto de l' fortikaĵo Jilava sentis, ke proksimiĝas la tempo, kiam K-do Gherea eliros nur kiel senviva korpo, li forsendis la strikanton en malsanulejon.

Studento 7369.



Ĉirkaŭ la 9-a SAT-Kongreso

Pri la Saksa "Svisio"

Post kelkhora veturado vagonara for de la kongresurbo de nia IX-a oni alvenas Dresdenon, kiu estas mondfama pro siaj artaj trezoroj. Ne sufiĉas horoj por ilin rigardi kaj studi. Pro tio K. K. agis trafe proponante ekskurson al ĝia plej bela ĉirkaŭaĵo, la Saksa "Svisio", kies koron oni povas atingi post unuhora veturado per vagonaro aŭ kelkhora vaporŝipe sur la riverego Elbe. Mencii apartajn vidindaĵojn estas preskaŭ neeble por naturamiko, ĉar ĉio estas vidinda kaj ĉie bele, ĉu oni troviĝas vale, surmonte aŭ intermonte. Jena fakto evidentigu la belecon de tiu ĉi regiono. Ĉiun sabatan vesperon kaj dimanĉan matenon la Dresdena ĉefstacidomo englutas multege da migrantoj sopirantaj al la montoj. Densege oni sidas, staras en la vagonoj. Pomo ofte ne povus fali planken. Riproĉoj al la fervoja ĉefadministracio aŭdiĝas, ĉar ĝi ne zorgis pri sufiĉe multe da vagonoj. Sed ju pli la vagonaro alprokimiĝas al la montaro, des pli malmultiĝas riproĉoj kaj la saksa humoro fine venkas. Ĉi tiu turmentado en la vagonoj ripetiĝas ĉiun semajnon. La legantoj eble pensas, ke mi volas fortimigi la Gek-dojn. Male, la linioj demandigu vin: "Kial laboristoj tutan semajnon ŝvitantaj en malbonordoraj fabrikoj suferas denove kaj denove pro tia veturado terura. Nu, simple pro la log-

anta naturĝuo en la Saksa “Svisio“, pro ĝiaj montoj, kiuj ja ne estas kompareblaj kun la alpoj, sed tamen prezentas pejzaĝon aparte ĉarmplenan: krute supreniĝantaj rokmuroj, rokokonusoj kaj interrokaĵoj, plej strangmaniere transformiĝintaj per la influo de malsekeco kaj aero dum jarmiloj. Belegaj arbaroj kovras montojn kaj valojn, kaj de sur la montsuproj oni ĝuas plej belan rondrigardon.

Por sufiĉe multe profiti la ĉarmon de Saksa “Svisio“ estus preferinda dutaga restado tiea, kiu ankaŭ permesus alveturadon vaporŝipan. Pri tranoktejoj en Dresden zorgos Dresdena SAT-anaro. Malkara tranoktebleco prezentiĝas en la hejmoj de Naturamikoj aŭ Junularo en la montoj. Sed tiuokaze estas nepre necese antaŭe scii la nombron da partoprenontoj.

Do Gek-doj partoprenontaj, anoncu vin sufiĉe frue kaj esprimu viajn dezirojn, kiuj laŭeble estos plenumataj. Adresu: P. Köckeritz, Tharandter Str. 6, Dresden-A. 28.

Antaŭkongreso en Rostock

Ĉar la nordlandanoj plej facile povas viziti la SAT-kongreson en Leipzig per la vojo Kopenhago—Rostock—Leipzig, la LEA-grupo Rostock intencas okazigi antaŭkongreson en tiu urbo. Vendredon, la 2-an de aŭgusto okazos “Internacia vespero“ komune kun la SAJ (Socialista Laborista Gejunularo). Sabate ni ekskursos tra la “Rostock-a erikejo“ al la maro, dimanĉon matene ni ekveturos — verŝajne karavane — al Leipzig. La veturprezo de Rostock al Leipzig estas 14.20 mk. g., karavane 9.50 mk. g. por la lignobenka klaso.

La havenurbo Rostock havas 83 200 enloĝantojn kaj estas interesa pro siaj malnovaj urbpartoj, antikvaj domoj, universitato, multaj grandaj malsanulejoj, muzeoj, ŝipkonstruejo, bestĝardeno, kremaciejo k. a. Bone kulturata rozĝardeno kuŝas meze en la urbo, same diversaj parkoj. Unu el la preĝejoj estas alta 126 m, ĝi hodiaŭ ankoraŭ estas gvidilo por la maristoj.

Ankaŭ la ĉirkaŭaĵo estas ĉarma. Tre malproksime la Balta maro kun sia blanka sabloordo. Laŭlonge la bordo estas granda arbaro “Rost. Heide“ (= Rostock-a erikejo) kun multaj cervoj, aproj, serpentoj kaj aliaj sovaĝaj bestoj.

La laborista movado en Rostock estas la plej forta en la tuta regiono Meklenburgo) kaj jam tre maljuna. La sindikata domo “Philharmonie“ havas grandan salonon por pli ol 1000 personoj, 2 malgrandajn salonojn, grupkunvenejojn ktp. En ĝi ankaŭ estas la plej multaj distriktsidejoj de la sindikatoj. La liberpensula movado ankoraŭ estas malforta: ĝi grupigas 234 membrojn. El la eklezio eksiĝis pli ol 3000 pers. La meza laborista salajro estas 30—60 mk. g. po semajno. Vivkondiĉoj sufiĉe bonaj. La LEA-grupo, kiu nombras 17 membrojn, tial kore invitas ĉiujn K-dojn veturontaj al Leipzig, partopreni nian antaŭkongreson.

Kiu intencas ĉeesti, sciigu tion al K-do Rudi Graetz, Rostock, Waldemarstr. 17, por ricevi laŭeble senkostan tranoktejon.

EL LA HISTORIO DE L' SOCIALISMO

14. Kolins[1]

La socialismo de Kolins, kiun liaj disĉiploj iom trokuraĝe nomas racia socialismo, estas nur agrara kaj parta kolektivismo (vidu “S-ulo“ 218, 220). Ĝi apogas sin sur kurioza filozofio, ĉar oni povas diri kun ia pravo, ke ĝi estas samtempe spiritualisma kaj ateisma: la Kolins-anoj kredas al la senmorteco de l' animo kaj neas dion. Por ili, la homo, inter ĉiuj estaĵoj, estas sole responda per tiu fakto, ke li portas en si animon — nematerian sentokapablon, diras la disĉiploj de Kolins, — unuigita kun materia organismo. Tiu ĉi sentokapablo donas al la homa estaĵo la konsciencon kaj tiel la elsaviĝon el la fatalo de l' fizika ordo.

Ekzistas do homa respondeco, kiu trovas sankcion en estonta ekzistado, kie tamen la justeco plenumiĝas sendepende de ĉiu dia koncepto. Oni rimarkas, ke tia filozofia doktrino ne povis trovi aprobon nek ĉe spiritualistoj, nek ĉe ateistoj.

De tiu filozofio la disĉiploj de Kolins deduktis konkludojn de socia karaktero. La homo, ili diris, estas en la naturo sole aktiva kaj libera aganto, li havas kiel mision prilabori la materion. La materio pasiva devas esti konstante je dispono de l' homo, aktiva estaĵo. La grundon la homo transformas en bienojn, en produktojn de akumulita laboro, kaj tiel naskiĝas la kapitalo. En ĉi tiuj kondiĉoj, se la grundo apartenas al li, la homo restas libera; se la grundo ĉesas aparteni al li, la homo fariĝas sklavo.

Nu, ĉar la homo devas resti libera, pro sia respondeco, necese ĉiuj membroj de la socio devas esti kaj resti posedantoj de l' socia grundo. Dum la laboro restos libera, la homolaborulo restos libera; dum en la nuna ekonomia reĝimo, kie la grundo estas aliproprigita al individuoj, la laboro, prizorgata de aliaj individuoj, estas laboro de sklavo.

Sed tiu konkludo estas sendependa de la Kolinsa filozofio. Pruvo por tio estas, ke la agrarkolektivismo ne estas neakordigebla kun spiritualismo, eĉ kristana filozofio, nek ankaŭ kun determinisma filozofio.

La Kolinsa koncepto pri la evoluo de l' socioj havas multajn analogiojn kun la furierista kritiko pri l' historio de l' civilizo.

Post tempo, kiam regas bruta perforto, bataloj, triumfas fine sociemaj fortoj, kiuj certigas al si dian konfirmon. Tiel malfermiĝas epoko de l' teokratia suvereneco, primitiva sanktigo de la subpremo de l' individuo fare de aristokratio. Tion nomas la Kolinsanoj la periodo de l' senklero kaj de l' subpremeblo al la ekzameno. En la dua fazo de l' homspirita evoluo ĉi lasta reĝimo estas atakata. Ĝi baldaŭ estas venkata per la disvolvo de l' libera ekzameno. Sub tiuj kreskantaj efikoj la suvereneco ĉesas esti aristokrata kaj teokrata, ĝi fariĝas popola. Tiun fazon la Kolinsanoj nomas periodo de senklero kaj nesubpremeblo al la ekzameno. Tiu ĉi periodo celas per subpremo de l' dia sankcio al ateismo, al materialismo, al reĝimo, kie regas sole, definitive, la leĝo de l' intereso.

“En tiu ĉi periodo la socia senklero, diras al ni Kolins, la senmoraleco kreskas proporcie kun la disvolviĝo de l' intelekto.“

Samtempe la mizero de l' amasoj fariĝas pli kaj pli intensa; ribeloj sinsekvas, baldaŭ sur la ruinoj de l' burĝa socia organizo renaskiĝas la reĝimo de teokratia suvereneco, kiel komence. En tiu ciklo turniĝas la socioj deorigine. Sed en iu tago tiu reveno al teokratia suvereneco estas neebla. Tiam la socio devas fali en anarkion kaj perei, aŭ transformiĝi konforme al racia socialismo. Nur tiam malfermiĝos la periodo de scio, la epoko de racia aŭ logokrata[1] reĝimo, kie oni fine ĝuos ordon kaj liberon.

Por Kolins temas, fari kolektiva la alproprigon de l' grundo. Por tion atingi, li proponas, transire, la nuligon de l' frataj heredoj kaj imposton de kvarono sur la testamentaj heredoj. Li opiniis, ke la kolektiveco de l' grundo pli kaj pli sin trudos kiel socia neceso, kaj realiĝos per la libera konsento de ĉiuj.

La Kolinsa moralo rezultas senpere el lia filozofio: ĉiuj homoj estas egalaj kaj fratoj. Krome, inter ĉiuj estaĵoj, la homo sola estas responda, ĉar li sola estas konscia, inteligenta kaj libera, kaj lia senmorta animo trovas en transa ekzistado konfirmon por sia respondeco. La moralscienco, bazita sur la disvolvo de sentoj pri libero, solidaro kaj respondeco, instruos al li, kiel li devas konduti kontraŭ siaspeculoj.

[1] Angle: Collins (1676—1729).

[1] Scienc-rega.

Se vi deziras konatiĝi kun la esperantista movado en Sovetio, kun la metodoj de esperantista propagando, varbado kaj instruado en Sovetio, abonu al

“Bulteno de CK SEU“

(Preskaŭ tute esperantlingva)

Jarabono 2 germanaj markoj. La abonpagon oni sendu al

K-do R. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio).

TRA ESPERANTIO

"SAV-ARMEA" LITERATURO

Aperigante ĉi suban skizon de K-do literatur-kritikisto, ni ne volas preterlasi la okazon por atentigi legantojn pri nia katalogo de SAT-verkoj. Nia Eldon-Kooperativo en relative mallonga tempo de sia ekzisto sukcesis eldoni jam tridekon da libroj diversenhavaj, literaturaj kaj sciencaj. Krome ni havas grandan provizon da presindaj kaj finpretigitaj manuskriptoj, kiuj nur atendas la favoran momenton, kiam la financaj povoj permesos ilian eldoniĝon. Ĉies devo estus helpi al plua progresigo de tiu entrepreno, tiom grava en la disvolviĝo de SAT, per mendo de libroj kaj per aĉeto de akcioj ebligante kaj garantiante prosperan SAT-eldonagadon. K-doj, ne malzorgu la subtenon al nia Eldon-Kooperativo[1]! — Red.

Kial en esp-o tiom abundas stultaj, fantaziaj, infanaj verkoj? Inter la dekok originalaj romanoj ĝis nun en esp-o skribitaj, kiujn nombras K-do Nekrasov en "La Nova Epoko", febr. 1929, nur unu, ŝajnas al mi, estas VIVA verko: "Viktimoj", de Baghy. Frenezaj titoloj regas: "Landoj de l' Fantazio" (kaj kia enuiga fantazio, laŭ la legitaj eltranĉoj), "Saltego trans jarmiloj", "Mirinda amo", "Nova Sento"...

Ni ne ektimu pro esp-o mem. Tio estas neŭtrala agado. Kiel savarmea agado, kiel religiaj agadoj, la neŭtrala esp-a movado ĉiam entenis iom da infaneca frenezeco, kiu tre malhelpis esp-on. Movado flankiĝas, kiam ĝin estras vivforuloj, iluziuloj, "iluminitoj".

Tre bedaŭrinda estas tiu manko en esp-a biblioteko. Almenaŭ, niaj sinjoroj neŭtraluloj, malvulgaruloj, estus devintaj scii lerte elekti la t r a d u k i n d a j n verkojn. Eĉ en tio ili ne sukcesis. Ankaŭ tradukitaj verkoj sonoras, odoras, kiel savarmea procesio. Jen inter la lastaj: "Aelita" vojaĝo al planedo Marso, — "La hantataj ŝipoj" (! Ĉu baldaŭ usonaj kino-romanoj?).

Tiel plenigis esp-an bibliotekon per senvaloraj verkoj eminentaj neŭtraluloj. Voĉdonado de laboristoj kaj kamparanoj, de tiuj vulgaruloj, revoluciuloj, sentaŭguloj, certe pli inteligente estus elektinta tradukindajn verkojn. Ĉu neŭtralaj eminentuloj estas stultuloj? Juĝu!

Mi preferus ne tiom facile pruvi tion kaj trovi inter la eldonoj de l' neŭtraluloj valorajn verkojn. La homajn perdojn mi ne ŝatas. Vera tempoperdo, laborperdo, estas tiaj eldonoj de legomaĉoj.

Esperanto devus prezenti al tutmonda legantaro unue la malpli tradukitajn klasikajn verkojn de VERAJ talentuloj. Eĉ la pli grandaj klasikaj aŭtoroj ne tradukiĝis tute en ĉiujn lingvojn. Legemuloj tre ŝatus trovi en Esp-o verkojn de germanoj Göte, Ŝiler, de francoj Volter, Rable', Montenj, de italoj Dante, Bokaĉjo, Karduĉi, Manzoni, kiuj ne tradukiĝis en ĉiujn nacilingvojn. Poste, kiam esp-o lerniĝos en ĉiuj lernejoj de la mondo, oni tradukus la pli famajn verkojn, jam sufiĉe konatajn ĉiulingve. Ĉar tiam la legantoj serĉos alilandajn verkojn prefere en Esp-o.

Samtempe devas tradukiĝi nunaj verkoj, ĉar esp-o tre tuŝas kaj helpas ĉiutagan vivon. El germana verkaro ekzemple, tradukiĝu verkoj de Henriko Mann, Ernesto Toller, Leonhardo Frank, Theodoro Däubler, Tomaso Mann, el rusa lingvo, de Maksim Gorkij, Fedor Gladkov, ... mankas al mi nomoj, kaj tio montras, kiom ankoraŭ ni sidas mallibereje inter landlimuroj. Sinjoroj neŭtraluloj traduku ekzilitojn-blankulojn, sed n u r t a l e n t a j n !

El franca lingvo tradukiĝu la malpli ĉiulingven tradukitaj verkoj de Anatol Frans, Romen Rolan, Ĵorĵ Dühamel', Lük Dürten, kiuj liveras inteligentajn bildojn de nuntempa mondo, la karakterizaj verkoj de Jan Tusöl (Jean Tousseul), Henriko Pulaj (Henri Poulaille). Neŭtraluloj traduku, se ili ŝatas, la anekdotajn verkojn de la tre talenta Léon Daudet (Leo Dode'). En vere talenta verko ĉiam kuŝas io utila. Mizeroj, kapitalismo tiom kontraŭstaris la vivon, ke talentoj tute malabundas. Ni ŝparu.

Do, ne stultaĵojn, ne plu stultaĵojn! Sufiĉas jam!

La kolekto de SAT-verkoj ege pli interesa estas, tion mi konstatas kun ĝojo. Ĝi nur eknaskiĝas; ĉiuj klopodu, por daŭrigi ĝin laŭ la sama spirito: agrablajn, sed nur PLENVALORAJN VERKOJN "SAT" eldonu.

Literaturaj subtiloj, kiel fakaj subtiloj, ne bezonas emocii ĉiujn. Por senti la belecon de ferponto, mi ne bezonas detale studi la matematikajn subtilojn de la konstruarto; kaj se la inĝeniero scias sufiĉe talente montri al mi la detalojn, mi komprenos. Verkistoj studu, plibonigu literaturan esprimpovon; tio estas faka laboro.

Sed senti poezion, muzikon, sukcesas privilegiuloj el ĉiuj klasoj (dum klasoj ankoraŭ ekzistas). Tiajn "privilegiulojn" formas sortaj hazardoj, forto de gepatra amo, ofte malsano dum infanjaroj. (Kia privilegio: pli suferi, pli senti!)

Certe, ili ne precipe devenas el burĝaj vicoj, ĉar burĝoj naskas sen amo, dormetas, malpli vivas. Kiom da burĝdevenaj artistaĉoj aŭ artistetoj nur sukcesis, ĉar ili "naskiĝis en artoj".

Neŭtraluloj ne diru, ke SAT eldonis bonajn verkojn nur dank' al severa pensmaniero de SAT-gvidantoj, ke laboristoj ŝatus aliajn librojn: SAT-verkoj vendiĝas. SAT-eldono ne bezonas subtenon per grupaj kotizoj. Kiu neŭtrala eldono povus diri la samon? — Do, felietonaĉoj ne sukcesas. Vi eminentuloj diris: "Ni flatos la malbelajn gustojn de la amasoj. Tiel ni vendos!" Sed la "amasoj" skuiĝas antaŭ tia "superhoma" maniero. Vi klopodu esti homoj, sinceraj homoj. Tio estas jam sufiĉe malfacila...

Ĉu vi jam varbis

novajn

abonantojn



por la pligrandigita

"S-ulo"?



FAKAJ KUNSIDOJ

dum la 9-a SAT-kongreso

Lastan jaron K-do M. Starr proponis al ni aranĝon de Konferenco, al kiu estu alvokataj reprezentantoj de laboristaj organizoj kaj ĉe kiu servu nur esp-o kiel traduklingvo. Mi bonakceptis la proponon kaj petis, ke la proponinto bonvolu preni sur sin la aranĝon de tiu konferenco. Laŭdinde nia K-do akceptis. Kiel oni scias, la rezulto ne estis plene kontentiga. Ĝi povus almenaŭ utili kiel leciono kaj estis esperinde, ke ĉi tiun jaron la sukceso estus pli granda. Bedaŭrinde K-do Starr forvojaĝis al Usono kaj ne povis denove preni sur sin la aranĝon de dua konferenco. Ni vane serĉis alian ĉefaranĝonton. Ni ĉiuj en la Direkcio estas jam tro ŝarĝitaj per diversaj laboroj, por povi alpreni kroman taskon. Ni do devas provizore rezigni la projekton kaj atendi pli favorajn cirkonstancojn.

Ni almenaŭ provos kompensi tiun mankon en nia laborplano per plilarĝigo de la fakkunsidoj. Interkonsente kun la Organiza Kongres-Komitato ni decidis fari specialan alvokon al la Sekci-gvidantoj (eduka, liberpensa, kooperativa, sporta, virina, junulara, scienc-kultura sekcioj) kaj al ĉiuj kongresontoj, kiuj povas preni sur sin aranĝadon de imponaj fakkunsidoj, por ke ili klopodu tiucele. La Kongres-komitato preparas invitleterojn, kiuj estos je la dispono de ĉiuj organizontoj de fakkunsidoj. Ili bonuzu ilin por akiri la subtenon kaj partoprenon de reprezentantoj de neesperantaj koncernaj organizoj. *Direkcio de SAT.*

* * *

La Kongres-Komitato jam difinis jenajn tagojn kaj horojn por fakkunsidoj. Kompletigojn oni proponu senprokraste al la K. K.

Lundon antaŭtagmeze je 9-a horo: raportantoj, ĵurnalistoj, labkoroj, fotoamatoroj ktp. Partoprenu tiun kunsidon ĉiuj Gek-doj servantaj kiel raportantoj k kunlaborantoj al gazetoj ktp.

---

[1] Adr.: R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

Lundon posttagmeze je 16-a horo: sindikataj kunsidoj laŭ industrigrupoj: metalistoj; lignaĵistoj; grafikistoj; konstrulaboristoj; ministoj; vestaĵfaristoj (tajloroj, ĉapelistoj, teksistoj, ledlaboristoj ktp.); trafiko (fervojo, tramo, poŝto ktp.); komunum-, ŝtat- k privatoficistoj; nutraĵmetioj; terkulturo; edukistoj k sciencistoj; tabaklaboristoj.

Mardon vespere je 19-a horo: sportuloj, gimnastuloj, naturamikoj; ruĝfrontanoj; ev. virinoj.

Merkredon vespere je 19-a horo liberpensuloj, junularo.

Ĵaŭdon je 16-a horo: partianoj (soc., kom., anark. ktp.).

Ni petas informi nin, se gravaj fakoj ankoraŭ mankas. Sed la laŭvican ordon ni ne ŝanĝu, por ne fuŝi la tagordon de la Kongreso. Nun estas via tasko, mendi ĉe K. K. invitleterojn k zorgi, ke multaj reprezentantoj de lab. organizoj partoprenu la fakajn kunsidojn. Ili nepre ankaŭ anoncu sin, por ke ni aparte povu statistiki k organizi tiujn kunsidojn. Respondecajn gvidantojn por la organizado de tiuj fakkunsidoj ni sciigos ankoraŭ.

Ĉu esperanto interligas infanaron?

Por ĝuste ekkoni la demandon, vane mi traserĉis en ĉiuj n-oj de "S-ulo". Aŭ okuloj miaj malsaniĝis subite, aŭ ili bezonas okulvitron, aŭ — mi timas eĉ diri — ne multo estas farita por interproksimigo infanara.

Ja ĉiu devas konstati, ke esp-o kaj ĝia bonega praktikilo — la tutmonda korespondado — tre multon povus fari por infana eduko. Se infanoj, ne posedantaj esp-on, kun helpo de l' gepatroj kaj aliaj esp-istoj komencus interkorespondadon pri siaj infanaj demandoj, ĉu ĝi ne alportus bonegajn rezultojn? Sed ne serĉu en "S-ulo" anoncojn pri infana korespondado — vi ilin ne ektrovos[1]. Tamen mi pensas, ke ne vane mi skribis tiun ĉi noton kaj mi esperas, ke baldaŭ aperos en "S-ulo" aparta anonc-faketo sub "Korespondado" kun aldono "porinfana". Mi kredas, ke la SAT-anoj devus evoluigi la aferon, kreante novan fidelan armeon — armeon de infan-propagandistoj, kiuj tuj anime komprenas la efektivigeblon de internacia ligo per esp-o. Se ĉiu el ni kunligus nur unu infanon kun alilanda proleta infano, ni preparus bonegan plantejon. P. Tilin (9310).

[1] Kiam K-do P. T. skribis tiujn liniojn, li ankoraŭ ne ekvidis la grandajn infan-anoncojn en n-oj 225 k 227, nek la febr. n-on de "La Lernanto". Sed ankaŭ antaŭe jam (kvankam ne tro ofte) li povus trovi en "S-ulo" korespondanoncojn de infanoj (ekz. pĝ. 120). Red.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

BULGARIO. La gazeto "Balkana Laboristo" aperas tre regule monate k faras viglan propagandon por SAT k kontraŭ la neŭtrala esp. gaz. en Bulgario, kiu troviĝas en la manoj de faŝistoj. — **Latvio.** La eniro de "S-ulo" k de ĉiuj SAT-eldonaĵoj en Latvion estas oficiale malpermesita k la cenzuro ĉe la poŝto havas instrukcion ne enlasi niajn presaĵojn. — **SOVETIO. Leningrad.** 18. marto okazis 1-a distrikta konferenco de SEU. Ĝin antaŭis bone starigita prepara laboro de Leningr. Komitato k rezulte ĝi estis treege vigla. Antaŭe fiksita normo por reprezento (1 delegito por 3 SEU-anoj) k ĝustatempa informo helpis venigi al la Konferenco krom multnombraj gastoj 178 voĉdonrajtajn delegitojn, el kiuj kelkaj venis el tre malproksimaj provincoj (Murmansk, Pskov k. a.). Kun nemalfortiĝanta atento k intereso oni pridiskutis dum longaj horoj multajn organizajn, mastrumajn k agit-propagandajn demandojn de l' organizo. En la debato ne mankis ankaŭ kritikoj pri iuj maltrafoj en la Komitata laboro. Sekvintaj reelektoj por la Komitato havis karakteron iom novigi k laborist-tendencigi ĝin novan membraron. Estis elektataj en ĝin 15 energiaj laboristoj de leningr. fabrikoj k aliaj laborejoj. J. G. (11 200). — **SVEDIO.** La socialdemokrata gazeto "Ny Tid" en Göteborg skribis 5. 3. redaktoran artikolon pri esp-o k por ĝia enkonduko en ĉiuj internaciaj kongresoj. (12 440.) — Laŭ raporto dum februara kunveno de lab. esp. klubo oni nun en Stokholmo k antaŭurboj instruas esp-on en 40 studrondoj kun 500 partoprenantoj. La kluba laboro ankaŭ estas vigla k en tuta Svedio la esp. movado forte kreskas. (13 906.)



En KOĤMA, malgranda urbo en la Ivanovo-Voznesenska regiono, kelkcent kilometrojn oriente de Moskvo, la tiea fervora esperantistaro inaŭguris urban placon je la nomo de D-ro Zamenhof. Nia bildo montras la sukcese laborantan grupon en solena kunveno.

Ĉe la neŭtraluloj

La japana ĵurnalo "Osaka Asahi" eldonis okaze de la surtroniĝa ceremonio specialan grandformatan revuon (anglalingvan) kun notoj pri la stato de l'esp. movado en Japanio. Laŭ tio la oficiala gazeto de l' Jap. Esp. Instituto "Revuo Orienta" (monata) havas nombron da 2200 abonantoj, ĉie troviĝas esp. societoj k nuntempe preskaŭ ĉiuj kolegioj havas esp. grupojn. Ili nombras 225. La plejmulto de la membroj estas studentoj. Ĉiujare okazas nacia kongreso. Sciencaj institucioj, precipe la medicina fako, aplikas praktike esp-o.

Pri kreo de esperanta lernejo

Dum mia migrado en Norvegio, kaj Svedio mi uzis la okazon por viziti la lokajn Gek-dojn, kaj ĉie mi aŭdis la samajn plendojn: granda klopodo, oferado de tempo, energio kaj mono dum jaroj kaj — preskaŭ nula rezulto. Por tio oni povas trovi multajn kaŭzojn. Unuflanke inerteco kaj indiferenteco de la amaso. Sed ĉu tio ankaŭ estas la motivo, pro kio forrestas multaj kursvizitantoj post kelkaj lecionoj? Mi opinias, ke la ampleksaj lernolibroj fortimigas la gelaboristojn, kiuj ofte dum jaroj ne okupis sin pri spirita laboro. Aliflanke mankas kapablaj instruantoj.

Kiel kontraŭi ĉi tiun lastan fakton? Per kreo de esperanta lernejo, kiu estus vizitebla de tutmondaj Gek-doj. Kompreneble komence tia instituto povus esti nek grandioza nek luksa (ĉi lasta ĝi neniam estu!), sed konforma al la laborista vivo. Mi memorigas pri propono farita dum la Göteborga kongreso pri esperantista kolonio. Per pruntepreno de landparcelo fakte oni povus doni realan fundamenton al la plano. Kaj oni aplikus la nuntempan instrumetodon: "Lerno per laboro".

La tergrundo estus kulturata de l' tutmondaj esperantistoj, kiuj tiel perlaborus siajn proprajn vivrimedojn kaj donus al la organizoj plej bonajn kaj sennaciajn K-dojn. Ĉar post la labortago estus tempo enprofundiĝi en la lingvo, diskuti, praktiki instrumetodojn naturajn, la tiel kulturitajn K-dojn eluzus la organizoj kiel instruantojn laŭ rekta metodo kaj kiel propagandistojn en alilingva teritorio. Certe la rezultoj estus bonegaj.

Sed ... kiu komencos ĉi tiun laboron? Mi ne dubas momenton, ke inter la SAT-junularo troviĝos kelkdeko da K-doj pretaj uzi siajn fortojn por plenumo de tia plano anstataŭ forkonsumi cerbon kaj karnon por la profito de l' subpremantoj. La Gek-doj pripensu ĝis la Leipziga Kongreso tiun proponon, kiun mi opinias tre grava.

A. S. 10 580.

Per legado vi lernas ... Legu regule ... Abonu la semajnan legaĵon — "S-ulo"!

Ĉe la religiuloj

La Oomoto-sekto fondita en Japanio akceptis antaŭ 6 jaroj esp-on por siaj celoj internaciaj. Tiam ĉiuj loĝantoj en la centra urbo Ajabe eklernis esp-on samtempe. Post unu jaro la organizita Propaganda Societo povis eldoni monatan organon "Verda Mondo", kiu havas jam pli ol 1100 abonantojn. La fako por fremdlanda propagando eldonas monate la organon "Oomoto", kiu regule aperas de kvin jaroj. Ambaŭ organizoj sendas kursgvidantojn, ofte je sia kosto, al ĉiu parto de Japanio. Por tiu prilaboro oni dividis la landon je tri sekcioj. La propagandistoj faras kursojn en vilaĝo post vilaĝo. Ili ne postulas monon, sed nur manĝon kaj loĝon. En Parizo ili eldonas ĵurnalon "Oomoto Internacia".

Dume en "Espero Katolika" oni povas legi jenon: "De kelka tempo la kontraŭstaro kontraŭ esp-o fariĝas pli kaj pli akra en iaj katolikaj medioj de kelkaj landoj. La malamikoj de nia lingvo tede ripetadas, en gazetartikoloj kaj paroladoj, la samajn kontraŭdirojn malnovajn. Esperanto estas lingvo framasona, socialista, soveta, unuvorte kontraŭeklezia. Multnombraj estas la katolikaj ĵurnaloj, kiuj akceptas artikolojn kontraŭ esp-o . . .

". . . la riproĉoj de niaj malamikoj havas ŝajne pravigan bazon. Ĉar de post la milito, la esperanti-movado ĝenerale pli kaj pli aspektas kiel kontraŭreligia, kontraŭkatolika movado. Por tio kontribuis la grandaj sukcesoj de esp-o en la socialistaj kaj sovetaj rondoj, la impona SAT-anaro; dume la katolikaj esp-istoj nenion faris katolike, kontentiĝante per kunlaborado al supozite neŭtrala esperanto-movado."

Pri la vorto "soveto"

Kvankam neoficiala, sed enkondukita jam de la vivo mem, la vorto "soveto" sendube troviĝos en nun preparata plena esperanta vortaro. Por ke la neologismo efektive riĉigu nian lingvon kaj ne estu superflua balasto, oni devas precize difini enhavon de la nova ideo, kiun ĝi kunportas. Laŭ la plej ofta ĝenerala uzo la vorto "soveto" egalas al "laborista kaj kamparana deputitaro", kiu estas elementa ero de ŝtata potenco dum epoko de proleta diktatoreco. Tial la esprimo "laborista soveto" enhavas ripeton, ĉar ja burĝa soveto ne povas esti. Kaj nur tia mallarĝa senco de la vorto lasas al ĝi ekzistorajton.

Bedaŭrinde kelkaj aŭtoroj donas alian sencon al la vorto. Ekzemple, en "Konstitucio de RSFSR", tradukita de K-do Rozenblat[1], ni trovas tiajn esprimojn: "soveto de popolaj komisaroj", "supera soveto de popola mastrumado" ktp. Nun jam mortinta K-do Rozenblat estis tiel tradukanta antaŭ kelkaj jaroj, kiam la vorto nur estis enkondukata kaj ĝia senco neklare difinita. Sed eĉ nun tiaj eminentaj niaj literaturistoj kiel K-do Kolĉinski aprobas similan uzon de la vorto. Sur oficialaj leteroj de Kremenĉuga Esp. Oficejo, gvidata de l'nomita K-do ni trovas surpresitaj la vortojn: "Intersindikata Soveto". Tia uzo de la vorto "soveto" faras ĝin sinonima al "komitato" aŭ "konsilantaro" kaj tial nebezona kaj superflua.

Teodoro Fedotov.

---

[1] En "Dokumentoj de Komunismo", SAT-eldono, 132 pĝ., Prezo 1 mk. g. ĉe Adm. en Leipzig.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

A. P. Andreev, Revolucio en lingvoscienco: Jafeta teorio de akademiano N. Marr. Eld. CK SEU, Moskvo 1929. Form. 13×17 cm. 40 pĝ. Prezo 20 kop.

Ĉi tiu verketo, same ruslingva kiel la antaŭa, pritraktas novan lingvo-teorion laŭ marksisma vidpunkto, la t. n. jafetan teorion de Marr. Niaj neruslingvaj K-doj havos baldaŭ okazon konatiĝi kun la enhavo de tiu verketo, ĉar ĝi aperos post nelonge en esp-o ĉe SAT.

E. Aisberg, J'ai compris la TSF (Mi komprenis la Radion). Tradukita el esperanto de P. Benoit. 146 pĝ. Form. 18½×23½ cm. Prezo 15 fr. fk. Eld. E. Chiron, 40, rue de Seine, Paris.

Jen verko unue aperinta en esp-o, en "Intern. Radio-Revuo", tradukita francen, eldonita plaĉe kun belaj, amuzaj ilustraĵoj. Ĝi aperis krome en 4 aliaj lingvoj k en preparo estas eldono en 2 aliaj lingvoj. Sukceso de esp-a laboro.

Demonstraci-tabeloj, Afiŝego, Afiŝoj. Eld. CK SEU, Spiridonovka 15, Moskvo. Prezo ne indikita.

Propagandmaterialo por ruslingvanoj; la afiŝego multkolora kun bildo simboliganta la unuiĝon de l' proletoj tutmondaj per esp-o; la afiŝoj sur diverskolora papero kun mallongaj dikliteraj varbtekstoj por div. medioj. La tabeloj en grandformato surhavas diklitere alfabeton k tutan gramatikon de esp-o, parte kun instruaj bildoj (ekz. por klarigo de la afiksoj k prepozicioj). Certe tiu materialo povos tre utili al niaj sovetiaj agemuloj en la varbado kaj lernigado. N. B.

Korekto. En la fruntartikolo en n-o 234, 1-a kolono, linio 24 de supre, estas grava malkorektaĵo. La koncerna frazo estas plene kripligita en la presejo. Komplete ĝi devas teksti: "Kie estas industria burĝaro, tie oni havas parlamentan reĝimon, solidan parlamenton, kiu nenion timos; tie, kie ne ekzistas burĝaro, povas ekzisti nur pseŭda parlamento, kiun la unua vento forlevos." Bonvolu korekti.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Signalen, Stokh., 14. 3. (Kiom da lingvoj en Eŭr.); Krasnij Til, Ivanovo-Voz., marto (Polio, 217, T. Muni, 222, Bulg., 217, resume).

Represis el "La Nova Epoko":

Neptuno (Bult. de oficistoj k lab. de Akvotransp.), Barcel., feb., Tunelo (Gorki).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 14. 3.; D. Deutsche Eisenb., Berlin, 10. 3.; Las Noticias, Barcel., 3. 3., 10. 3.; I. T. F.-Bulteno, A'dam, marto.

Peresper. materialon enpresis:

Travail, Lyon, 16. 3.

Pri la Kongreso presis:

Informservo de Anark. Jun. Intern., A'dam, marto.

☆ GRANDA NIĴNI-NOVGOROD



Kanavino, "Ruĝa Etna"

Metallaboristoj de "Ruĝa Etna", havantaj propran presorganon "Fajrero de Ruĝa Etna" (antaŭnelonge murgazeto) deziras partopreni internacian korespondadon kolektivan kaj individuan pri kulturaj, IRH, liberpensaj, viraj, politikaj, sportaj kaj aliaj demandoj. Adreso: Klubo je nomo de M. I. Kalinin, Esperanta rondeto, Kanavino, "Ruĝa Etna", Nijnij-Novgorod, USSR.

100 edukistoj

volas kolektive korespondi kun vi!

Aliĝu al edukista labor-rondo

TEPS sendante *ĉiumonate* artikolon pri vialanda *lernejo* k *instruistaro*. Vi ricev. *ĉiumonate* **senpage** 12—16-paĝan *informilon* (TEPS-leteraron), 4—8-paĝan gazeton *"Vojo de Klerigo"*. Sendu tuj artikolon al:

Marcel Boubou, 96, rue Saint-Marceau **Orléans (Loiret), Francio.**

Por la 9-a SAT-Kongreso

Sigelmarkoj: 60 ekz. (1 folio) 0.50 mk. g.
Leterfolioj kun kovertoj: 15 ekz. 0.50 mk. g.
Tuj mendu ĉe: W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24 aŭ ĉe Adm. de SAT.

La 1-an de majo

internacian solenan tagon de la laboristaro, vi devas festi kiel signon de internaciismo. Sendu salutojn al diversaj partioj kaj profesiaj unuiĝoj de *Örebro*, Svedio.

Leginda, nepre leginda estas

Prozo Ridetanta

Noveloj originale verkitaj de Raymond Schwartz.

—o—

Prezo: 3 mk. g. inkl. la sendkoston.

Havebla ĉe Administrejo de SAT.

NIA POŜTO

D. Sn. — Pri la literat. artik. vi interrilatu rekte kun K-do Nekrasov; certe li bezonos kelkajn el la nomitaj manuskriptoj. Materialo por SSKP aperos ĉiumonate; la alia materialo nur iom post iom utiliĝos laŭ dispono de loko. Pri ĉio alia en taŭga tempo. N. B.

10 580. — Via artik. jam delonge estas kompostita. Nur manko de loko ĝis nun ne permesis ĝin enmeti.

10 262. — Sendita manuskr. aperos. La aluditan poemon ni ne posedas ĉi tie; povas esti, ke ni transsendis kun materialo por "La N. E." al M.

5893. — Ĉar ni posedas abundon da orig. materialo, ni ne povas uzi vian tradukon. Nur en okazo de bezono ni elĉerpos ion.

14 074. — Baldaŭ vi legos specialan komunikon pri la Vortaro en "S-ulo".

12 961. — Tiajn alvokojn ni ne povas enmeti senpage. Red.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do P. Bollwig, Schelmergasse 4-a/6, Wiener-Neustadt, dez. koresp. k interŝ. PM (laŭ katal. aŭ peco po peco). Nepre resp.

ĈEKOSLOVAKIO

K-do Emilo Chudoba, Stonava, Silezio, dez. koresp. kĉl pri ĉ. t., L, PI, bfl., PM, esp-aĵoj. Malakceptas PI, kiuj ne estas bfl. afrankitaj.

FRANCIO

K-do G. Corley, Montigny (Oise), dez. koresp. kun rus., ĉin., jap. K-doj. Nepre resp. L, PM, bfl.

GERMANIO

Herbert Geisler (kompostisto), Hartauerstr. 74, Hirschberg i. Rsgb. dez. koresp. kĉl, L, PK. Resp. garant.

K-do Fritz Neumann (kompostisto), Hartauerstr. 51, Hirschberg i. Rsgb., dez. koresp. kĉl., L, PK. Resp. garant.

— 50 gejunuloj en 4 kursoj dez. koresp. kolektive kun alil. kursoj k soc. junulargrupoj. Adr.: G. Nitzsche, Volkshaus, IV., Chemnitz, 16.

— Kvar Gek-doj dez. koresp. kĉl, L, PI. Adr.: K-dino Ida Pusch, Peterstr. 6, b. Frl. Schäfer, Görlitz i. Schl.

Adresŝanĝo. — K-do Fredo Beck, Wingertstr. 21, b. Orth, Mannheim-Neckerau (stratŝanĝo).

K-do Rudi Naumann, Wartburgstr. 31, Dresden-A. 19, dez. koresp. kun veturontoj al junulartago en Wien.

K-do Karl Dassler, Erdmannstr. 8, Leipzig W 31, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl.

K-do M. Petzold, Bahnhofstr. 7, Netzschkau i. Vogtl., dez. koresp. kĉl pri politiko, IRH, L, PM. Nepre k akurate resp.

Atentu! — Gelaboristoj, Grupoj, Ĉeloj estas petataj, okaze de 1-a de Majo multnombre sendi salutlet. por interesigi la lab-istaron por esp. Resp. garant. Adr.: Alfred Bachmann, Körnerstr. 5, Chemnitz.

LATVIO

— 3 K-dinoj dez. koresp. L, PI. Adr.: Minna Griman, Lorenca iela 8—6, Liepaja.

SOVETIO

K-do B. Egers, Klovski sp. 4,1, Kiev, dez. aĉeti aŭ ricevi interŝ. Sennaciulon *222*.

Atentu kaj helpu!

1. 5.—5. 5. ni aranĝos *grandan esp. ekspozicion.* El ĉ. 1. tuj k amase sendu esp-aĵojn: esp. gvidlibrojn, gazetojn, ĵurnalojn aŭ nacil. kun per-pri-esp. artik. resumoj; esp. propagandaĵojn, *prifervojajn aĵojn;* komunist. gazetojn, propagandilojn.

Por 1. 5. k tago de gazetaro sendu apartajn kolektivajn salutlet. (laŭeble de viaj komunistaj organizoj, labkoroj, redakcioj, sindikatoj ktp.). Resp. garantiata. Adr.: USSR, *Samara,* Dorprofsoĵ, Dorbjuro esperantistov. — K-dece B. Jeleznjakov (5585). (P. S. Vidu mian anoncon en "S-ulo" n-o 234.)

K-do V. Mioduŝevski, Poĉajevska str., 44, Petrovka, Kiev, dez. koresp. interŝ. PM, il. gaz. Resp. garantiata.

K-do Daniŝevski, A., Proletarska str., 46,2, Kiev, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-dino Inja Ivanova, Poŝtkesto, 9, Smolensk, serĉas koresp-adon nur el Anglio, Japanio k Ameriko. L, PI. Resp. garantiata.

K-dino Mario Durnovo, Poĉtanskaja, 2, kv. 3, Smolensk, dez. koresp. nur kun angloj, L, PI.

K-do Muraviev, Pokrovka, 31, obŝĉeĵitie, M. T. S. km. 12, Moskvo, dez. koresp. pri ĉ. temoj. Nepre resp.

K-do B. Ydovenko (fotoamatoro), Oktjabrskaja, 26, Moskvo-Lublino, dez. koresp. kĉl pri div. temoj, L, PI. Resp. certe.

K-do Boris Stefanov, P./O. Viŝne-Dolgoje, Elec. distr. C. Ĉ. O., dez. koresp. kĉl pri politikaj k klerigaj temoj, PM. Resp. garantiata.

— Ĉelo de IRH petas informojn pri alil. IRH, same resp. viajn demandojn. Adr.: Kostroma, Gubsovpartŝkola, V. Lakomkin.

— Esp. rondeto dez. koresp. kun lab. esp. grupoj pri div. temoj. Adr.: Kapitanovka, Ŝevĉenkovsk. okr., Klubo Hurtok "Esperanto".

— 15 gelernantoj (sovetoficistoj), dez. koresp. kĉl pri ĉ. temoj. Adr.: Samara, ploŝĉadj Revolucii, klubo de Vorovskij, Esp.-Rondeto.

— Koresp-antoj k amikoj notu la novan adreson de K-do Viktoro Fallin-Stroganov, Kiroĉnaja, *32—34,* kv. *26,* Leningrad-*28* (antaŭe en Smolensk k Minsk).

— *20* gelaboristoj dez. koresp. kĉl, L, PK. Adr.: Iv.-Voznesensk, ul. Peski, Klubo Profintern, Kruĵok Esp.

SVEDIO

K-do Eric H. Lander, Grashutt, Karlsborg, dez. koresp. kĉl, L, PI, PM, bfl., esp-aĵoj. Resp. garantiata.

La Kleriga Fako de Aŭstria Laborista Ligo Esperantista

organizos internacian koresp-adon pri ĉ. temoj. Ni garantias nepran respondon. — Oni turnu sin per leteroj aŭ PK al: Werner Rentmeister, **Wien III,** Kölblgasse 10 (Aŭstrio).

Internacional-stenografio

en ĉiuj lingvoj. Gvidilo por Esperanto 1 mk. g. + 10% sendkostoj. Gvidilo en aliaj lingvoj.

Instituto de Internacionalstenografio
Duisburg, Friedensstrasse 79, Germ.

SAT-anoj! Izoluloj! Grupoj! Organizoj!

de via fervoro dependas enkonduko de esp-o en lernejojn de Moskva gubernio: Sendu salutleterojn k diversajn aktualaĵojn por al lernantoj de ŝtata laborlernejo en Ĉuĥlinka. Adr.: N. J. Davydov, Ĉuĥlinskaja ŝkola. **Perovo,** *Moskva gub. Sovetio.*
Ĉio nepre estos rekompencita, *kion garantias SAT-ano 12963.*

1. de majo

ENHAVO:

	pago
La venonta venengas-milito	249—50
Pro kadavro de kadavriginto	250
La senlaboruloj en Kanado	250
La sekvoj de sendependiĝo	251
La Ŝamana mistero	251—52
Ŝpinistinoj venkis	252
Sennaciula Scienc-Kultura Paĝo	253—54
Diskutejo	254—55
El nia leteraro	255
Ĉirkaŭ la naŭa SAT-Kongreso	255—56
El la Historio de l' Socialismo	256
Tra Esperantio, Korespondado	257—60

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)